“Kaj se la prezo de unu funto da sukero estas tridek ses cendoj, kiom mi devas pagi por kvar funtoj da sukero?”

“Tiam vi devas pagi unu eŭron kaj kvardek kvar cendojn.”

“Mi volas scii ankaŭ la prezon de du kilogramoj da salo, se la prezo de unu kilogramo estas dudek cendoj.”

“La prezo de du kilogramoj estas kvardek cendoj.”

“Se mi havas kvin eŭrojn, ĉu mi havas sufiĉe da mono?”

“Jes, du eŭroj kaj dudek kvin cendoj, unu eŭro kaj kvardek kvar cendoj kaj kvardek cendoj estas kvar eŭroj kaj naŭ cendoj. Se vi pagos kvin eŭrojn, mi redonos al vi naŭdek unu cendojn.”

“Mi tre dankas vin, sinjoro!” Kaj la knabo iras al la pordo.

“Ĉu vi volas atendi dum kelkaj momentoj? Mi ankoraŭ ne estas preta.”

“Sed mi tute ne volas aĉeti tion. Hieraŭ en la lernejo mi estis maldiligenta, kaj mi devis fari la laboron hejme. Vi faris tion por mi. Mi kore dankas vin, sinjoro. Bonan tagon, sinjoro!” Rapide li forkuras el la butiko.

- 2 Dek plus unu estas dek unu.
La patrino aĉetis dek du ovojn.
Ĉu ankaŭ vi timas la nombron dek tri?
Dek plus dek estas dudek.
Kvardek plus tridek estas sepdek.
Tridek du plus kvindek sep estas okdek naŭ.
Sesdek kvar plus tridek ses estas precize cent.
Cent sepdek du plus kvarcent okdek sep estas sescent kvindek naŭ.
En nia urbo loĝas proksimume kvardek kvin mil homoj.
Ĉu vi konas urbon kun du milionoj da enloĝantoj?

Tien en één is elf.

Moeder kocht twaalf eieren.

Ben je ook bang voor het getal dertien?

Tien en tien is twintig.

Veertig en dertig is zeventig.

32 + 57 = 89

64 + 36 is precies honderd.

172 + 487 = 659

In onze stad wonen

ongeveer 45.000 mensen.

Ken je een stad met

2.000.000 inwoners?

De hoofdtelwoorden zijn onveranderlijk, maar *nulo*, *miliono*, *miliardo*, *biliono* zijn zelfstandige naamwoorden en kunnen dus *-j*, *-n* of *-jn* krijgen en gevolgd worden door *da*.

- 3 *En la ĉambro staras seso da seĝoj.* *In de kamer staat een zestal stoelen.*
Nia dekunuo gajnis la konkurson. *Ons elftal won de wedstrijd.*
Mi vidis centojn da homoj. *Ik zag honderden mensen.*

Door achtervoeging van *-o* wordt van een hoofdtelwoord een zelfstandig naamwoord gevormd.

- 4 *Li estas la unua vizitanto.* *Hij is de eerste bezoeker.*
Ni loĝas en la oka domo. *Wij wonen in het achtste huis.*
Vi devas lerni la dudek-trian lecionon. *Jullie moeten de 23e les leren.*

Door achtervoeging van *-a* wordt van een hoofdtelwoord een rangtelwoord gevormd. Bij in woorden geschreven rangtelwoorden van twee of meer woorden wordt het laatste daarvan door een streepje (-) van het daaraan voorafgaande gescheiden³.

- 5 *Unue vi devas kompreni la regulojn,* *Ten eerste moet je de regels begrijpen,*
due vi devas lerni la vortojn, kaj trie *ten tweede moet je de woorden leren*
vi devas multe paroli. *en ten derde moet je veel spreken.*
Unue ni manĝos, post tio ni studos. *Eerst gaan we eten, daarna zullen we studeren.*

Door achtervoeging van *-e* wordt van een hoofdtelwoord een bijwoord gevormd.

6 Leren:

<i>nulo</i>	<i>nul</i>	<i>konkurso</i>	<i>wedstrijd</i>
<i>miliono</i>	<i>miljoen</i>	<i>leciono</i>	<i>les</i>
<i>miliardo</i>	<i>miljard</i>	<i>vorto</i>	<i>woord</i>
<i>biliono</i>	<i>biljoen</i>	<i>prezo</i>	<i>prijs</i>
<i>dekunuo</i>	<i>elftal</i>	<i>mono</i>	<i>geld</i>
<i>ovo</i>	<i>ei</i>	<i>pagi</i>	<i>betalen</i>
<i>regulo</i>	<i>regel</i>	<i>kosti</i>	<i>kosten</i>
<i>momento</i>	<i>ogenblik</i>	<i>redoni</i>	<i>teruggeven</i>
<i>enloĝanto</i>	<i>inwoner</i>	<i>atendi</i>	<i>wachten</i>
<i>vizito</i>	<i>bezoek</i>	<i>timi</i>	<i>vrezen, bang zijn</i>
<i>vizitanto</i>	<i>bezoeker</i>	<i>preta</i>	<i>gereed, klaar</i>
<i>hejmo</i>	<i>huis, tehuis</i>	<i>cent</i>	<i>honderd</i>
<i>viziti</i>	<i>bezoeken</i>	<i>mil</i>	<i>duizend</i>
<i>koni</i>	<i>kennen</i>	<i>precize</i>	<i>precies, juist</i>
<i>scii</i>	<i>weten</i>	<i>proksimume</i>	<i>ongeveer</i>

³ Voorbeelden: *la deka taso*, *la dudeka leciono*, *la sescenta domo*; maar:
la dek-kvina taso, *la tridek-dua leciono*, *la mil naŭcent okdek-tria jaro*.

kompreni	<i>begrijpen</i>	hejme	<i>thuis</i>
fermi	<i>sluiten, dicht</i>	sufiçe	<i>genoeg</i>
	<i>doen</i>	kiam ⁴	<i>wanneer, als</i>
malfermi	<i>openen</i>	tiam	<i>dan, toen</i>
gajni	<i>winnen</i>	çe	<i>bij, ten huize van</i>
deziri	<i>wensen,</i>	se	<i>als, indien</i>
	<i>verlangen</i>	unue	<i>eerst, ten eerste</i>

Vi pravas! Vi estas prava!
Prave!

U hebt gelijk!
Juist zo!

7 Lezen:

47	134	1.234	234.000	42.000.826
93	275	17.826	730.082	81.375.000
32	829	39.712	802.009	72.820.075
25	563	74.641	100.001	39.007.608
76	748	83.529	207.200	50.250.009

8 Uitrekenen en in woorden schrijven:

7 + 12 =	28 - 12 =	4 + 10 + 12 + 25 =
28 + 33 =	77 - 25 =	18 + 7 + 15 + 40 =
76 + 125 =	119 - 39 =	26 + 8 + 9 + 31 =
308 + 512 =	258 - 113 =	41 + 16 + 5 + 22 =
634 + 66 =	841 - 288 =	36 + 9 + 7 + 48 =

9 Vertalen en terugvertellen № 1.

10 Tel van 1 tot 100; ook terug. Tel met tientallen van 100 tot 500.

⁴ in de verleden tijd als voegwoord gebruikt, wordt *kiam* vertaald met *toen*:
Wij groetten **toen** de buurman voorbij ging = *Ni salutis, kiam la najbaro preterpasis.*

LES 10

1 Legu:

Lernu Esperanton!

Vi ŝatas lerni Esperanton, mi scias tion. Per Esperanto vi povos kompreni la homojn en fremdaj landoj. Vi povos skribi al ili leterojn kaj vi povos legi iliajn leterojn.

Lernu Esperanton! Aŭskultu bone, kiam la instruisto parolas al vi. Rigardu atente al la nigra tabulo, kiam li skribas. Legu multe, ne nur mallaŭte, sed ankaŭ laŭte. Studu bone, se vi ŝatas rapide lerni Esperanton.

Parolu Esperanton ne nur en la Esperanta leciono, sed ankaŭ hejme al viaj fratoj kaj fratinoj. Se ili ne komprenas vin, ne estu malĝojaj. Ankaŭ ili povas lerni Esperanton, ĉar ĝi ne estas tre malfacila, se oni nur diligente studas.

Por Esperanto vi ne bezonas multe da mono; sed unue lernu, due legu, kaj trie parolu ĝin. Tio tute ne estas malagrabla. Mi estas certa, ke vi estos kontentaj, kaj viaj fratoj kaj fratinoj estos enviaj, se ili ne lernis ĝin.

- | | |
|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 2 Johano, helpu vian patron.
Knaboj, aŭskultu bone kaj estu diligentaj.
Lavu viajn manojn.
Envenu!
Bonvolu respondi poŝtrevene. | <i>Johan, help je vader.
Jongens, luister goed en wees ijverig.
Was je handen.
(Komt u) Binnen!
Wees zo goed per omgaande te antwoorden.</i> |
| Ni laboru.
Li silentu.
Li ripozu en paco. | <i>Laten wij werken.
Laat hij zwijgen.
Hij ruste in vrede.</i> |

De gebiedende wijs van het werkwoord wordt gevormd door de uitgang *-u*; ze houdt niet altijd een gebod in, doch ook vaak een verzoek of een wens.

- | | |
|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 3 La patrino lavas la knabinon.
La patrino lavas ŝin.
La patrino lavas sin (mem).
Ĉu Johano jam povas vesti sin?
Li pensas nur pri si mem.
Ili vojaĝis kun siaj patro kaj patrino. | <i>Moeder wast het meisje.
Moeder wast haar.
Moeder wast zich(zelf).
Kan Johan zich al kleden?
Hij denkt alleen aan zichzelf.
Zij reisden met hun vader en moeder.</i> |
|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Het wederkerend voornaamwoord voor de 3e persoon enkel- en meervoud is *si*; het bijbehorend bezittelijk voornaamwoord is dus *sia*.

4 Li promenis kun sia amiko kaj
sia patro.
Li promenis kun sia amiko kaj
lia patro.
Li kaj lia amiko promenis.

*Hij wandelde met zijn vriend en
zijn vader.
Hij wandelde met zijn vriend en
diens vader.
Hij en zijn vriend wandelden.*

Si en sia hebben altijd betrekking op het onderwerp en kunnen dus nooit *zelf* onderwerp of deel van het onderwerp zijn.

5 Multaj infanoj jam estas en la
lernejo, kelkaj estas ankoraŭ
sur la ludejo.
La kuiristino laboras en la kuirejo.
Dimanĉe ni iras al la preĝejo.
Ĉu tie estas la enirejo de la muzeo?
Ne, tio estas la elirejo.
Mia ĉapelo estas en la vestejo.

*Veel kinderen zijn al in de school,
enkelen zijn nog op de speel-
plaats.
De kokkin werkt in de keuken.
's Zondags gaan we naar de kerk.
Is daar de ingang van het museum?
Neen, dat is de uitgang.
Mijn hoed is in de garderobe.*

Het achtervoegsel *-ej* vormt de naam van een plaats of ruimte, bestemd voor iets.

6 Lernu:

dimanĉo	zondag	poŝto	post
lundo	maandag	preĝi	bidden
mardo	dinsdag	danci	dansen
merkredo	woensdag	lavi	wassen
ĵaŭdo	donderdag	ripozi	rusten
vendredo	vrijdag	vesti	kleden
sabato	zaterdag	enveni	binnenkomen
lando	land	reveni	terugkomen
letero	brief	helpi	helpen
festo	feest	rompi	breken
ĝojo	vreugde	amuzi	vermaken
paco	vrede	atenti	oplettten
ludejo	speelplaats	studi	studeren
kuirejo	keuken	gratuli	feliciteren, gelukwensen
preĝejo	kerk	bezoni	nodig hebben
naĝejo	zwembad	fali	vallen
dancejo	danszaal	bonvoli	zo goed zijn te
studejo	studeerkamer	ĝoji	zich verheugen, blij zijn
laborejo	werkplaats	enui	zich vervelen
vestejo	kleedkamer, garderobe	erari	zich vergissen
lavejo	wasserij	fremda	vreemd
enirejo	ingang	facila	gemakkelijk
elirejo	uitgang		

muzeo	<i>museum</i>	honesta	<i>eerlijk</i>
agrabla	<i>aangenaam</i>	sia	<i>zijn, haar, hun</i>
certa	<i>zeker</i>	baldaŭ	<i>gauw, spoedig</i>
kioma	<i>hoeveelste</i>	mem	<i>zelf</i>
ĝoja	<i>verheugd, blij</i>	ke	<i>dat (voegw.)</i>
dimanĉe	<i>'s zondags</i>	pro	<i>door, ten gevolge</i>
si	<i>zich</i>		<i>van, wegens</i>

Pardonu!	<i>Pardon!</i>
(Mi petas) pardonon!	<i>Neem me niet kwalijk!</i>
Ĝis baldaŭ!	<i>Tot spoedig!</i>

7 Respondu:

Ĉu dimanĉo estas la unua tago de la semajno? Kioma tago estas ĵaŭdo? Ĉu lundo estas la tria tago? Kie ludas la infanoj? Kie vi lernas Esperanton? Ĉu vi naĝas en naĝejo? Ĉu vi eniras la muzeon tra la elirejo? Ĉu vi povas vesti vin mem? Ĉu malgranda infano lavas sin? Pri kio vi pensas? Ĉu vi vojaĝos al fremda lando? Ĉu vi estas certa pri via respondo? Ĉu ili amuzos sin dum la festo? Ĉu la filino helpas sian patrinon? Pro kio vi ĝojas?

8 Invullen: (*lia, ŝia, ĝia, ilia of sia*):

Mia najbaro sidas en ĝardeno. filo staras apud li. Ili rigardasn ĝardenon kunj belaj floroj. ĝardeno estas granda. herbo estas verda kajj floroj estas ruĝaj, flavaj, bluaj kaj blankaj. La du homoj ĝojas pro ĝardeno. Ili rigardas al domo. El domo venas knabino. Ŝi iras alj patro kaj frato. Ŝi parolas kun patro kaj ŝi ludas kun hundo. hundo estas malgranda, sed vosto estas longa, kaj kruroj estas fortaj. La knabino kaj frato ludas kun hundo.

9 Vertalen en terugvertellen № 1.

10 Rakontu pri via najbaro kaj lia ĝardeno.

LES 11

1 Legu

La amiko de la patro.

Antaŭ unu semajno la patro venis de sia laboro al la hejmo kaj rakontis, ke li parolis kun malnova amiko. Lia amiko estis dum kelkaj jaroj en fremdaj landoj, kaj multe vojaĝis tra la tuta mondo; sed antaŭ unu monato li revenis. La patro ankaŭ diris, ke lia amiko venos al ni kaj rakontos pri siaj vojaĝoj. Ni, infanoj, tre ĝojis pri tio.

Hieraŭ la amiko venis. Ni pensis, ke li estas granda, forta viro. Sed ni eraris. Li estas nur malgranda, maldika viro. Sed li povas tre bele rakonti. Ni aŭskultis kun multa atento, kiam li parolis. Li diris, ke li estis en multaj landoj kaj vidis multajn homojn. Li ne povis bone paroli kun ili. Sed en kelkaj urboj li povis paroli kun homoj. Ili sciis Esperanton, kaj ankaŭ li estas esperantisto. Pro tio li povis paroli kun la fremdaj homoj, kaj li diris, ke li tre ĝojas, ke li povas kompreni ilin, kaj ili komprenas lin.

Ni rakontis al li, ke ni lernas Esperanton en la lernejo. Ni esperas, ke ankaŭ ni povos paroli kun lernantoj en fremdaj landoj aŭ povos skribi al ili leterojn.

2 Li skribis: “Mi estas malsana”.
Li skribis, ke li estas malsana.
Ŝi diris: “Mi estis feliĉa.”
Ŝi diris, ke ŝi estis feliĉa.
Mi pensis: “Vi estas honesta.”
Mi pensis, ke vi estas honesta.
Mi esperas: “Morgaŭ estos bela vetero.”
Mi esperas, ke morgaŭ estos
bela vetero.

Hij schreef: “Ik ben ziek.”
Hij schreef, dat hij ziek was.
Zij zei: “Ik ben gelukkig geweest.”
Zij zei, dat ze gelukkig geweest was.
Ik dacht: “Je bent eerlijk.”
Ik dacht, dat je eerlijk was.
Ik hoop: “Morgen is het mooi weer.”

Ik hoop, dat het morgen mooi weer is.

In de indirecte rede staat het werkwoord in dezelfde vorm, als in de directe rede gebruikt zou zijn.

3 La patro deziris: “Vi estu diligentaj.”
La patro deziris, ke ni estu diligentaj.
Li postulis: “Foriru!”
Li postulis, ke mi foriru.
Ni volis: “Ili tuj venu.”

Ni volis, ke ili tuj venu.

Vader wenste: “Jullie moeten ijverig zijn.”
Vader wenste, dat we ijverig waren.
Hij eiste: “Ga weg!”
Hij eiste, dat ik wegging.
Wij wilden: “Zij moeten dadelijk komen.”
Wij wilden, dat ze dadelijk kwamen.

Na werkwoorden die een wil of een wens te kennen geven, krijgt het werkwoord in de bijzin de uitgang *-u* (ook dit is te beschouwen als een indirecte rede).

- | | |
|----------------------------------|----------------------------------------------|
| 4 Ĉu vi baldaŭ revenos? | <i>Kom je gauw terug?</i> |
| Mi redonos la libron al vi. | <i>Ik zal je het boek teruggeven.</i> |
| La pilko resaltis de la tero. | <i>De bal sprong van de grond terug.</i> |
| Bonvolu relegi la lastan frazon. | <i>Wil de laatste zin nog eens lezen.</i> |
| Mi rediros mian respondon. | <i>Ik zal mijn antwoord nog eens zeggen.</i> |
| Ĝis revido! | <i>Tot weerziens!</i> |

Het voorvoegsel *re-* betekent: *terug* of *nog eens*, *opnieuw*. Soms veroorzaakt deze dubbele betekenis onduidelijkheid en is omschrijving nodig, b.v.:

- | | |
|-------------------------|--------------------------------------|
| Mi returne pagis eŭron. | <i>Ik betaalde een euro terug.</i> |
| Mi denove pagis eŭron. | <i>Ik betaalde opnieuw een euro.</i> |
- 5 Estas varme. *Het is warm.*
 Estas bone lerni Esperanton. *Het is goed Esperanto te leren.*
 Estas bone, ke vi venis. *Het is goed, dat je gekomen bent.*

In zinnen *zonder onderwerp*, met een *onbepaalde wijs als onderwerp* of met een *bijzin als onderwerp* gebruikt men de *bijwoordsvorm*.

6 Lernu:

januaro	<i>januari</i>	pilko	<i>bal</i>
februaro	<i>februari</i>	salti	<i>springen</i>
marto	<i>maart</i>	resalti	<i>terugspringen</i>
aprilo	<i>april</i>	rediri	<i>opnieuw zeggen</i>
majo	<i>mei</i>	revidi	<i>weerzien</i>
junio	<i>juni</i>	repagi	<i>terug of opnieuw betalen</i>
julio	<i>juli</i>		
aŭgusto	<i>augustus</i>		
septembro	<i>september</i>	turni	<i>draaien</i>
oktobro	<i>oktober</i>	returni	<i>terugdraaien</i>
novembro	<i>november</i>	reiri	<i>terugkeren</i>
decembro	<i>december</i>	esperi	<i>hopen</i>
mondo	<i>wereld</i>	postuli	<i>eisen</i>
atento	<i>oplettendheid</i>	lasta	<i>laatste</i>
minuto	<i>minuut</i>	antaŭlasta	<i>voorlaatste</i>
sekundo	<i>seconde</i>	sana	<i>gezond</i>

superjaro	schrikkeljaar	malsana	ziek
jarcento	eeuw	denove	opnieuw
frazo	zin	returne	terug
post	na	malofte	zelden
postmorgaŭ	overmogen	subite	plotseling
antaŭhieraŭ	eergisteren	tuj	dadelijk
ofte	vaak, dikwijls	ĝis	tot
Li diras ke jes.	Hij zegt van ja (wel).		

7 *Respondu:*

Ĉu dimanĉo estas la lasta tago de la semajno? Ĉu vendredo estas la sesa? Ĉu aprilo estas la kvina monato? Ĉu aŭgusto estas la deka monato? Ĉu novembro estas la antaŭlasta monato? Ĉu hodiaŭ estas dimanĉo? Ĉu hieraŭ estis lundo? Ĉu postmorgaŭ estos mardo? Kiom da tagoj havas superjaro? Kiom da sekundoj havas horo? Kiom da tagoj havas februaro? Ĉu multaj monatoj havas tridek tagojn? Ĉu vi ofte eraras? Kiu malofte eraras? Ĉu vi povas alte salti? Kiu legis la lastan frazon, kaj kiu la antaŭlastan?

8 *Invullen:*

La lernanto sidas la lernejo benko. Li skribas plumo. Lia libro kuŝas la kajero. La kraĵono falis; ĝi kuŝas la benko la planko. La knabo ne aŭskultas la instruiston; li rigardas la fenestro la kolomboj. Ili flugas la arboj; nur kelkaj sidas la tegmento la domo. La knabo ne pensas sia laboro. Li ne rigardas la instruisto. Subite la instruisto staras li kaj demandas: “..... kio vi pensas?”

9 Vertalen en terugvertellen № 1.

10 Rakontu en kia domo vi loĝas.

LES 12

1 Legu:

La fulmotondro.

Hieraŭ dum la posttagmezo estis tre varme. La infanoj ne plu ludis, ĉar ili estis lacaj pro la ludo. Estis agrable por ili naĝi en la malvarma akvo de la rivero. La suno brilis malagrabla; tute ne estis vento. La homoj devis labori, sed tio ne estis facila; ili estis baldaŭ lacaj pro la varmo.

En la vespero oni aŭdis tondron. Ankaŭ la infanoj aŭdis ĝin kaj ili iris en la domon. La gepatroj ne laboris; ili estis pretaj kaj ankaŭ ili aŭskultis la tondron kaj rigardis la fulmon. La fulmotondro alvenis. Fulmotondro povas estis danĝera. Kiam tondras, la homoj estas malĝojaj. La infanoj ne iras al la lito, sed ili devas atendi.

Feliĉe hieraŭ la fulmotondro ne estis danĝera. Subite pluvis; jen fulmis ankoraŭ, jen tondris, sed ne multe. La pluvo falis teren. La infanoj rigardis tra la fenestro. Ili vidis la pluvon. Ankaŭ hajlograĵojn ili vidis. Ofte hajlas, kiam fulmotondras. La infanoj estis kontentaj, ke la fulmotondro foriris. Ili iris al la lito kaj pensis: "Morgaŭ la vetero denove estos bela, ne varma; ni povos ludi."

2 Mi vojaĝos al Parizo.	}	<i>Ik zal naar Parijs reizen.</i>
Mi vojaĝos Parizon.		
Li reiras al la hejmo.	}	<i>Hij keert naar huis terug.</i>
Li reiras hejmon.		
Li reiras hejmen. (meest gebruikelijk)		
La kato saltas al sur la tablo. (niet gebruikelijk)	}	<i>De kat springt op de tafel.</i>
La kato saltas sur la tablon.		
Ŝi iras al en la parko (niet gebr.)	}	<i>Zij gaat het park in.</i>
Ŝi iras en la parkon.		
Al kie vi veturas? (niet gebr.)	}	<i>Waarheen rijd je?</i>
Kien vi veturas?		

Het voorzetsel *al* geeft een beweging aan; deze kan echter ook worden aangeduid door een *-n* achter het zelfstandig naamw. of bijwoord te plaatsen. Zo kan dus ook na een voorzetsel de accusatief volgen (vgl. les 6).

Na *al* en *ĝis* volgt nooit de accusatief, omdat de beweging al door het voorzetsel uitgedrukt is.

El en *de* geven niet de beweging aan, maar het punt van uitgang. Ze worden dus nooit gevolgd door de accusatief.

3 Mi promenas en la parko.	<i>Ik wandel in het park</i>
Mi promenas en la parkon.	<i>Ik wandel het park in.</i>
La libro kuŝas sur la tablo.	<i>Het boek ligt op de tafel.</i>

Mi metas la libron sur la tablon. La muso iras sub la ŝranko.	<i>Ik leg het boek op de tafel. De muis loopt onder de kast (heen en weer).</i>
La muso iras sub la ŝrankon.	<i>De muis loopt onder de kast (vanuit de kamer b.v.).</i>
4 Mi loĝas ĉe miaj gepatroj. Ĉu vi ofte vizitas viajn geavojn? Gesinjoroj Jansen loĝas apud ni.	<i>Ik woon bij mijn ouders. Bezoek je je grootouders vaak? De heer en mevrouw J. wonen dicht bij ons.</i>
En nia klaso estas tridek geler- nantoj. Gesinjoroj, mi salutas vin.	<i>In onze klas zijn dertig leerlingen (jongens en meisjes). Dames en heren, ik groet u.</i>

Het voorvoegsel *ge-* verenigt beide geslachten.

5 Mi loĝas en urbo: ĉu ankaŭ vi estas urbano? Ne, mi estas vilaĝano. En Nederlando loĝas preskaŭ dek du milionoj da nederlandanoj. Nia klubo havas kvardek (klub)-anojn. Li ne estas kristano.	<i>Ik woon in een stad; ben jij ook een stedeling? Nee, ik ben een dorpeling. In Nederland wonen bijna 12.000.000 Nederlanders. Onze club heeft 40 (club)leden. Hij is geen christen.</i>
------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Het achtervoegsel *-an* vormt de naam van een bewoner, lid of volgeling.

6 Lernu:

suno	zon	danĝero	gevaar
fulmo	bliksem	gepatroj	ouders
tondro	donder	gesinjoroj	{ dames en heren, mijnheer en mevrouw
fulmotondro	onweer		
vento	wind	geavoj	grootouders
neĝo	sneeuw	urbano	stedeling
pluvo	regen	vilaĝano	dorpeling
hajlo	hagel	eksterlando	buitenland
frosto	vorst	Nederlando	Nederland
prujno	rijp	nederlandano	Nederlander
roso	dauw	klubo	club
degelo	dooi	klubano	clublid
hajlograjno	hagelsteen	Kristo	Christus
glacio	ijs	kristano	christen
klimato	klimaat	fulmi	bliksemen
mezo	midden	tondri	donderen
tagmezo	middag (12 uur)		

posttagmezo	<i>namiddag</i>	fulmotondri	<i>onweren</i>
printempo	<i>lente</i>	venti	<i>waaien</i>
somero	<i>zomer</i>	neĝi	<i>sneeuwen</i>
aŭtuno	<i>herfst</i>	pluvi	<i>regenen</i>
vintro	<i>winter</i>	hajli	<i>hagelen</i>
sezono	<i>seizoen, jaargetijde</i>	frosti	<i>vriezen</i>
rosi	<i>dauwen</i>	prujni	<i>rijpen</i>
degeli	<i>dooien</i>	laca	<i>moe, vermoeid</i>
brili	<i>schijnen, schitteren</i>	danĝera	<i>gevaarlijk</i>
meti	<i>leggen, zetten</i>	preskaŭ	<i>bijna</i>
blovi	<i>blazen</i>	ekster	<i>buiten</i>
grimpi	<i>klimmen</i>	jen ... jen	<i>nu eens ... dan weer</i>
saluti	<i>groeten</i>	por	<i>om te</i>
veturi	<i>rijden</i>	plu	<i>meer, langer</i>
Pluvas!	<i>Het regent!</i>	nun	<i>nu</i>

7 Respondu:

Kien vi iras? Ĉu vi iras al la lernejo? Ĉu vi baldaŭ venos hejmen? Ĉu la patro jam estas hejme? Ĉu vi ŝatas vojaĝi eksterlanden? Kie estas la kreto? Ĉu vi metis ĝin sur la tablon? Kien vi metis mian plumon? Ĉu ĝi ne kuŝas sur la kajero? Ĉu ĝi falis sur la plankon? Ĉu la muso kuris en la ĉambro? Kie estas la hundo? Ĉu ĝi iris eksteren? Ĉu vi estas laca pro la laboro? Ĉu fulmotondro estas danĝera? Ĉu la neĝo estas blanka? Kiam ofte frostras? Ĉu neĝas en la somero?

8 Invullen (-n of niets):

En la mateno_ mi iris el la domo_. Sur la strato_ mi vidis miaj_ amikoj_. Ankaŭ_ ili iris la la lernejo_. Mi iris kun ili_. Apud la lernejo_ ni vidis nia_ instruisto_. Ni rapide kuris al li_. Ni rakontis li_, ke Johan_ ne venos en la lernejo_ car li estas malsana. Li falis de arbo. Ni parolis laŭte, kaj la instruisto_ ne komprenis ni_. Li demandis mi_. Mi diris, ke hieraŭ Johano_ estis en la ĝardeno_. Tie li ludis kun sia_ frato_. Li grimpis sur alta_ arbo_. Sed subite li falis sur la tero_. Lia_ frato_ portis li_ en la domo. Nun li kuŝas en la lito_. Ni esperas, ke post kelkaj_ tagoj_ li denove estos sana_ kaj povos iri kun ni al la lernejo_.

9 Vertalen en terugvertellen № 1.

10 Rakontu pri la vetero en la vintro.

LES 13

1 Legu:

En la mateno.

Kiam mia patrino vekas min en la mateno, mi tuj saltas el la lito. Mi lavas min, mi brosas miajn dentojn kaj kombas miajn harojn. Mi vestas min. Poste mi iras al la manĝoĉambro, kie miaj gepatroj kaj gefratoj jam sidas ĉe la tablo. Tiam mi matenmanĝas. La patrino verŝas teon en la tasojn. Mia malgranda fratino ne trinkas teon, sed la patrino donas al ŝi glason da lakto. La patro legas la ĵurnalon kaj tial li ne volas, ke mi multe parolu dum la matenmanĝo. Kelkfoje ni forgesas tion, sed kiam la patro rigardas al ni, aŭ nur tusetas, ni komprenas tion, kaj silentas.

Post la matenmanĝo la patro iras al sia laboro. Ni, infanoj, iras al la lernejo. Nur la malgranda fratino restas hejme ĉe la patrino. Ŝi ankoraŭ ne devas labori, sed ŝi ludas dum la tuta tago. La patrino laboras en la hejmo kaj zorgas, ke la tagmanĝo estu preta, kiam ni hejmenvenas el la lernejo.

- | | |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 2 Vi estas same granda kiel mi.
Unu metro estas tiel longa kiel dek centrimetroj.
Ŝi kantas same bele kiel sia fratino.
Vi krias tiel laŭte kiel via amiko. | <i>Jij bent even groot als ik.
Eén meter is zo lang als tien decimeter.
Zij zingt even mooi als haar zuster.
Jij schreeuwt even hard als je vriend.</i> |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Bij gelijkheid van twee hoedanigheden gebruikt men *same* *kiel* of *tiel* *kiel*.

- | | |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 3 Dek estas pli ol ses.
Funto estas malpli ol kilogramo.
Monto estas pli alta ol monteto.
Monato estas malpli longa ol jaro.
Vi skribas pli bele ol mi.
Johano kuras malpli rapide ol vi. | <i>Tien is meer dan zes.
Een pond is minder dan een kilogram.
Een berg is hoger dan een heuvel.
Een maand is minder lang dan een jaar.
Jij schrijft mooier dan ik.
Johan loopt minder hard dan jij.</i> |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Bij ongelijkheid tussen twee hoedanigheden of hoeveelheden gebruikt men *pli* *ol* voor meerdere mate en *malpli* *ol* voor mindere mate.

- | | |
|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 4 Li estas la plej bona lernanto en la klaso.
Johano estas la malplej granda knabo.
El la kvar knaboj li estas la plej malgranda.
Ŝi kantas plej bele. | <i>Hij is de beste leerling in (van) de klas.
Johan is de minst grote (kleinste) jongen.
Van de vier jongens is hij de kleinste.
Zij zingt het mooist.</i> |
|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Bij vergelijking van meer dan twee zelfstandigheden of hoedanigheden gebruikt men *plej* voor de hoogste en *malplej* voor de laagste graad.

Let dus op:

El ambaŭ fratoj li estas la pli aĝa kaj laboras pli diligente.

Van de beide broers is hij de oudste en werkt het ijverigst.

5 En nia lando ne estas montoj, sed nur montetoj.

In ons land zijn geen bergen, alleen maar heuvels.

La malriĉa familio loĝas en dometo.

Het arme gezin woont in een hutje.

La akvo estas varmeta.

Het water is lauw.

La vento estis malvarmeta.

De wind was koel.

Post la tagmanĝo mia patro ŝatas dormeti.

Na het middagmaal houdt mijn vader ervan even te sluimeren.

Vi ne bezonas rideti pri tio.

U behoeft daarover niet te glimlachen.

Het achtervoegsel *-et* geeft een zeer sterke verkleining te kennen.

6 Hieraŭ estis ventego en nia regiono.

Gisteren was er een storm in onze streek.

Estu singarda; la akvo estas varmega.

Wees voorzichtig: het water is heet.

Via respondo estas bonega.

Uw antwoord is uitstekend.

Mia najbaro estas riĉega.

Mijn buurman is schatrijk.

La avino estas maljunega.

Grootmoeder is stokoud.

Het achtervoegsel *-eg* geeft een zeer sterke vergroting te kennen.

7 *Lernu:*

monto	<i>berg</i>	aĝo	<i>leeftijd</i>
monteto	<i>heuvel</i>	ridi	<i>lachen</i>
dometo	<i>hutje, huisje</i>	rideti	<i>glimlachen</i>
venteto	<i>zuchtje</i>	ridegi	<i>schaterlachen</i>
ventego	<i>storm</i>	konstrui	<i>bouwen</i>
regiono	<i>streek</i>	krii	<i>schreeuwen,</i>
familio	<i>gezin</i>	veki	<i>roepen</i>
tagmanĝo	<i>middagmaal</i>	brosi	<i>wekken</i>
matenmanĝo	<i>ontbijt</i>	kombi	<i>borstelen</i>
manĝoĉambro	<i>eetkamer</i>	malvarmeta	<i>kammen</i>
verŝi	<i>(in)schenken,</i>	malvarmega	<i>koel</i>
	<i>gieten</i>	bonega	<i>ijskoud</i>
forgesii	<i>vergeten</i>		<i>uitstekend</i>

tusi	hoesten	maljunega	stokoud
tuseti	kuchen	singarda	voorzichtig
resti	blijven	poste	daarna
zorgi	zorgen	kelkfoje	soms
matenmanĝi	ontbijten	pli ol	meer dan
hejmenveni	thuiskomen	malpli ol	minder dan
dormeti	sluimeren	same...kiel	} zo (even) als
riĉa	rijk	tiel...kiel	
riĉega	schatrijk	plej	meest
malriĉa	arm	malplej	minst
malriĉega	straatarm	ambaŭ	beide
varmeta	lauw	kial	waarom
varmega	heet	tial	daarom
malvarma	koud	do	dus

Kiel eble plej granda. } Zo groot mogelijk.
Tiel granda kiel eble. }
Plej bone ridas, kiu laste ridas. } Wie het laatste lacht, lacht het best.
Barelo malplena sonas plej laŭte. } Holle vaten klinken het hardst.

8 Respondu:

Kiu el vi estas la plej granda? Kiu estas pli aĝa, via patro aŭ via patrino? Ĉu via avo estas maljunega? Ĉu Londono estas urbego? Ĉu turo estas pli alta ol domo? Ĉu metro estas pli longa ol kilometro? Kio estas la plej forta: hundo, muso aŭ elefanto? Kio estas la malplej granda? Kio estas pli: cent kvardek aŭ kvarcent dek? Ĉu elefanto estas fortega besto? Kial vi forkuris? Kiu skribas plej bone? Kiu kriis plej laŭte? Ĉu vi estas pli aĝa ol via frato? Ĉu vi ŝatas esti riĉega? Ĉu estas montoj en nia lando? Kie estas la plej alta monto?

9 Invullen:

Cent estas okdek. Dudek estas dek ok plus tri. La avo estas aĝa la patro. Elefanto estas granda kaj forta leono. Monto estas alta monteto. Dometo estas granda domo, sed domego estas la granda. Mia najbaro havas multan monon; mi ne estas riĉa li. Mi kuris kun mia frato; li kuris rapide mi, do mi gajnis la konkurson.

10 Vertalen en terugvertellen N^o 1.

11 Rakontu pri via familio.

LES 14

1 Legu:

Malfacila enigmo.

Malgranda Karlo diris al sia patrino: “Mi scias ion, kion vi ne scias.”

“Tio povas esti; mi ja ne scias ĉion”, respondis la patrino.

“Sed vi tute ne povas diveni tion; ĝi estas malfacila enigmo.”

“Nu, diru al mi ion, kaj mi klopodos diveni. Se vi diras nenion, mi tute ne povas kompreni, pri kio vi pensas.”

“Ĝi estas besto kun kvar piedoj.”

“Ĉevalo!”

“Ne, sed mi ankoraŭ ne diris ĉion. Ĝi estas besto kun kvar piedoj, kun vosto kia de ĉevalo, oreloj tiel longaj kiel de azeno kaj barbo kia de la avo. Kio estas tio?”

“Tion mi ne scias. Tio estas tro malfacila por mi.”

“Ĉu mi diru la solvon al vi?”

“Jes, bonvolu!”

“Tio estas nia kato!”

“Ne, Karlo, tio ne estas bona. Nia kato tute ne havas barbon, nek longajn orelojn, nek ĉevalan voston.”

“Tion mi scias; sed la enigmo devas esti malfacila.”

2 Kio estas tie sur la planko?

Tio estas kreto.

Ĉu kuŝas io sur la tablo?

Ne, ĉio falis sur la plankon.

Do restis nenio sur la tablo.

Wat ligt daar op de vloer?

Dat is een krijtje.

Ligt er iets op de tafel?

Neen, alles is op de vloer gevallen.

Dus is er niets op de tafel gebleven.

De woordjes *kio*, *tio*, *io*, *ĉio* en *nenio* zijn vijf 'korelativoj'.

Er zijn nog acht zulke vijftallen met dezelfde beginletters, doch een andere uitgang.

De korelativoj op *-o* kunnen alleen zelfstandig gebruikt worden.

Bij alle korelativoj hebben de beginletters dezelfde betekenis, nl.:

ki_ *vragend en betrekkelijk (zie 4);*

ti_ *aanwijzend;*

i_ *onbepaald;*

ĉi_ *allesomvattend;*

neni_ *ontkennend.*

3 Kion vi diras?

Tion mi ne kredas.

Mi aŭdas ion en la ĉambro.

Ĉu vi forgesis ĉion?

Mi vidas nenion belan.

Wat zeg je?

Dat geloof ik niet.

Ik hoor iets in de kamer.

Ben je alles vergeten?

Ik zie niets moois.

De korelativoj op *-o* kunnen de uitgang *-n* krijgen doch nooit de meervouds-*j*.

4 Tion, kion vi diras, mi ne kredas.
Io, kio kuŝis sur la tablo, falis.
Ĉio, kio estas en la skatolo,
apartenas al mi.
Nenio, kion vi diris, estas vera.
Mi ne venis, pro kio li koleris.

*Dat, wat je zegt, geloof ik niet.
Iets, dat op de tafel lag, is gevallen.
Alles, wat in de doos is, behoort
aan mij.
Niets, wat je gezegd hebt, is waar.
Ik ben niet gekomen, waarover
hij boos was.*

Kio kan alleen betrekkelijk voornaamw. zijn bij de antecedenten *tio, io, ĉio, nenio* of *een hele zin*. Het antecedent en het betrekkelijk voornaamw. hebben de onderwerps- of voorwerpsvorm naar gelang de functie, die ze in het *eigen* zinsdeel vervullen.

5 (Tio,) kio kuŝas sur la tablo,
apartenas al mi.
Tio, kion vi diras, ne estas vera.
Tion, kio estas en la skatolo, mi
donas al vi.
(Tion,) kion vi diras, mi ne kredas.

*Wat op de tafel ligt, behoort aan mij.
Wat je zegt, is niet waar.
Wat er in de doos is, geef ik aan jou.
Wat je zegt, geloof ik niet.*

In het Nederlands wordt het betrekkelijk voornaamwoord *wat* vaak zonder het antecedent *dat(gene)* gebruikt. In het Esperanto mag dat alleen, wanneer het antecedent dezelfde naamvalsvorm zou hebben als *kio(n)*.

6 Ĉu estas sukero en la sukerujo?
La cigaredujo estas plena de
cigaredoj.
Prenu alumeton el la alumetujo.
En nia ĝardeno staras tri pomujoj
kaj unu pirujo.
La rozujo havas belegajn rozojn.
La angloj loĝas en Anglujo, la
francoj en Francujo kaj la
germanoj en Germanujo.

*Is er suiker in de suikerpot?
De sigarettenkoker is vol sigaretten.
Neem een lucifer uit het lucifersdoosje.
In onze tuin staan drie appelbomen
en één pereboom.
De rozestruik heeft prachtige rozen.
De Engelsen wonen in Engeland,
de Fransen in Frankrijk en de
Duitsers in Duitsland.*

Het achtervoegsel *-uj* betekent:

1e: een voorwerp, bestemd om een aantal door de stam uitgedrukte voorwerpen te bevatten;

2e: een boom of een struik, waaraan het door de stam genoemde groeit;

3e: een land, waarin het in de stam uitgedrukte volk woont.

Soms kan er misverstand ontstaan door deze drieledige betekenis; dan bedient men zich van andere middelen, b.v.:

tekruĉo = theepot; *teskatolo* = theebus; *tearbeto* = theestruik.

Vergelijk: *belgo* *Belgujo* (land der Belgen)
Nederlando *nederlandano* (onderdaan van Nederland)

Zo ook: *Meksiko* *meksikano*
Ameriko *amerikano* enz.

In plaats van *-ujo* wordt bij namen van landen vaak *-io* gebruikt: *Belgio*, *Francio*, *patrio* (= *patrujo* = vaderland). Ook *-lando* is gebruikelijk: *Ruslando*, *Danlando* enz. naast *Rusujo* (*Rusio*), *Danujo* (*Danio*).

7 *Lernu:*

<i>enigmo</i>	<i>raadsel</i>	<i>pruno</i>	<i>pruim</i>
<i>ĉevalo</i>	<i>paard</i>	<i>prunujo</i>	<i>pruimeboom</i>
<i>azeno</i>	<i>ezel</i>	<i>ĉerizo</i>	<i>kers</i>
<i>solvo</i>	<i>oplossing</i>	<i>ĉerizujo</i>	<i>kersenboom</i>
<i>barbo</i>	<i>baard</i>	<i>rozujo</i>	<i>rozenstruik</i>
<i>vero</i>	<i>waarheid</i>	<i>kruĉo</i>	<i>kruik, pot, kan</i>
<i>kolero</i>	<i>boosheid</i>	<i>arbeto</i>	<i>struik</i>
<i>sukerujo</i>	<i>suikerpot</i>	<i>anglo</i>	<i>Engelsman</i>
<i>cigaredujo</i>	<i>sigarettenkoker</i>	<i>Anglujo</i>	<i>Engeland</i>
<i>alumeto</i>	<i>lucifer</i>	<i>franco</i>	<i>Fransman</i>
<i>alumetujo</i>	<i>lucifersdoosje</i>	<i>Francujo</i>	<i>Frankrijk</i>
<i>paperujo</i>	<i>portefeuille</i>	<i>Karlo</i>	<i>Karel</i>
<i>monujo</i>	<i>portemonnee</i>	<i>germano</i>	<i>Duitser</i>
<i>tabakujo</i>	<i>tabaksdoos</i>	<i>Germanujo</i>	<i>Duitsland</i>
<i>cigarujo</i>	<i>sigarenkoker</i>	<i>belgo</i>	<i>Belg</i>
<i>plumujo</i>	<i>pennendoosje</i>	<i>Belgujo</i>	<i>België</i>
<i>pomujo</i>	<i>appelboom</i>	<i>dano</i>	<i>Deen</i>
<i>piro</i>	<i>peer</i>	<i>Danujo</i>	<i>Denemarken</i>
<i>pirujo</i>	<i>perenboom</i>	<i>norvego</i>	<i>Noor</i>
<i>Norvegujo</i>	<i>Noorwegen</i>	<i>vera</i>	<i>waar</i>
<i>svedo</i>	<i>Zweed</i>	<i>kolera</i>	<i>boos, kwaad</i>
<i>Svedujo</i>	<i>Zweden</i>	<i>plena de</i>	<i>vol (met)</i>
<i>sviso</i>	<i>Zwitser</i>	<i>io</i>	<i>iets</i>
<i>Svisujo</i>	<i>Zwitserland</i>	<i>ĉio</i>	<i>alles</i>
<i>diveni</i>	<i>raden</i>	<i>nenio</i>	<i>niets</i>

klopodi	<i>proberen, trachten</i>	ja	<i>immers, toch, wel</i>
kredi	<i>geloven</i>	nek	<i>noch</i>
aparteni	<i>(toe)behoren</i>	vere	<i>waarlijk</i>
koleri	<i>boos zijn</i>	nu	<i>nu, welnu</i>
preni	<i>nemen</i>	tamen	<i>echter, toch</i>
malfacila	<i>moeilijk</i>		

Pli bone io ol nenio
Fino bona, ĉio bona.

*Beter een half ei dan een lege dop.
Eind goed, al goed.*

8 Respondu:

Kie loĝas la svisoj? Ĉu en Francujo loĝas svedoj? Kiuj loĝas en Anglujo? Ĉu pi-
roj kreskas sur pomujo? Ĉu vi metas la cigarojn en tabakujon? Kio estas en
monujo? Kio estas teujo? Kio kreskas sur rozujo? Kie estas viaj cigaroj? Ĉu la
alumetujo estas plena de plumoj? Kie estas la plumoj? Ĉu restas cigaredoj en
via cigaredujo? Kio kreskas sur ĉerizujo? Kie loĝas la norvegoj? Ĉu la danoj
loĝas en Svedujo? Kiuj loĝas en Nederlando?

9 Invullen (-an, -ar, -ej, -ist, -uj):

Ni lernas en la lern.....o; tie la instr.....o instruas nin. En la ink.....o estas inko.
La kuir.....o kuiras en la kuir.....o. En la arb.....o staras mujltaj arboj. En urbo
loĝas urb.....oj, en vilaĝo vilaĝ.....oj. En nia ĝardeno estas pom.....oj, pir.....oj
kaj unu ĉeriz.....o; la ĝarden.....o zorgas pri ili. La danoj loĝas en Dan.....o, la
nederland.....oj en Nederlando. La bak.....o laboras en la bak.....o. Metu vian
monon en vian mon.....on kaj viajn paperojn en vian paper.....on. En la buŝo
troviĝas dent.....o.

10 Vertalen en terugvertellen № 1.

11 Rakontu pri via laboro.

LES 15

1 Legu:

Kiu estas li?

Mi konas iun, kiun ankaŭ vi konas, sed mi supozas, ke vi ne povas diveni, pri kiu mi parolas. Tiu persono apartenas al nia familio, kiu konsistas el sep anoj: patro, patrino, tri filoj kaj du filinoj. Ĉiuj loĝas en nia domo. Mi havas patron, patrino, du fratojn kaj du fratinojn. Do nun vi povas scii, kiu mi estas. Sed mi ne parolos pri mi; mi parolos pri tiu persono, kiu estas la filo de miaj gepatroj kaj la frato de miaj gefratoj. Kiu li estas? Certe li estas neniu el miaj fratinoj. Ĉu li estas iu frato de mi? Vi supozas ke jes, sed vi eraras. Li estas frato de miaj gefratoj. Do nun ĉiu scias: tiu knabo estas mi mem.

- | | |
|-----------------------------|--------------------------------------|
| 2 Kiu estas via frato? Tiu! | <i>Wie is uw broer? Die daar!</i> |
| Ĉu estas iu en la ĉambro? | <i>Is er iemand in de kamer?</i> |
| Ĉiu kredas vin. | <i>Iedereen gelooft je.</i> |
| Neniu volis akompani min. | <i>Niemand wilde me vergezellen.</i> |

Zelfstandig gebruikt duiden de korelativoj op *-u* personen aan.

- | | |
|----------------------------|------------------------------------------------|
| 3 Kiu akompanis vin? | <i>Wie vergezelde je?</i> |
| Iuj asertis, ke li pravus. | <i>Enigen verzekerden, dat hij gelijk had.</i> |
| Mi konis ĉiujn. | <i>Ik kende allen.</i> |
| Ĉu vi vidis neniun? | <i>Heb je niemand gezien?</i> |

De korelativoj op *-u* kunnen *-j*, *-n* of *-jn* krijgen.

- | | |
|---------------------------|-------------------------------------|
| 4 Kiu kraĵono estas via? | <i>Welk potlood is van u?</i> |
| Tiu viro estas mia onklo. | <i>Die man is mijn oom.</i> |
| Ĉu vi legis tiun libron? | <i>Heb je dat boek gelezen?</i> |
| Donu al mi iun plumon. | <i>Geef me een of andere pen.</i> |
| Ĉiuj homoj devas labori. | <i>Alle mensen moeten werken.</i> |
| Mi vidis ĉiujn librojn. | <i>Ik heb alle boeken gezien.</i> |
| Neniu fiŝo povas flugi. | <i>Geen enkele vis kan vliegen.</i> |

Bijvoeglijk gebruikt bepalen de korelativoj op *-u* zowel zaken als personen.

- | | |
|---------------------------------------------|---------------------------------------------------------------|
| 5 La viro, kiu staras tie, estas mia avo. | <i>De man die daar staat, is mijn grootvader.</i> |
| La libron, pri kiu vi parolas, mi ne legis. | <i>Het boek waarover jullie spreken, heb ik niet gelezen.</i> |
| La domoj, kiujn mi aĉetis, ne estas novaj. | <i>De huizen die ik gekocht heb, zijn niet nieuw.</i> |

La homoj, kun kiuj mi vojaĝis,
estis tre ĝentilaj.

*De mensen met wie ik gereisd
heb, waren heel beleefd.*

Als betrekkelijk voornaamwoord heeft *kiu* zowel zaken als personen tot antecedent.

6 (Tiu,) kiu ŝtelas, estas ŝtelisto.
Tiun, kiu asertas tion, mi ne kredas.
Tiu, kiun mi renkontis, ne salutis.
(Tiun,) kiun mi renkontis, mi ne
konis.

*Wie steelt, is een dief.
Wie dat beweert, geloof ik niet.
Wie ik ontmoette, groette niet.
Wie ik ontmoette, kende ik niet.*

Wie staat in het Nederlands vaak voor: *hij, die; degene, die*. In het Esperanto mag het antecedent alleen dan ontbreken, wanneer het dezelfde naamvalsvorm zou hebben als het betrekkelijk voornaamwoord.

7 En nia urbo loĝas multaj riĉuloj.
Mi kompatas tiun blindulon.
Demandu iun alian; mi ne estas
spertulo.

*In onze stad wonen veel rijken.
Ik heb medelijden met die blinde.
Vraag iemand anders; ik ben
geen deskundige.*

Het achtervoegsel *-ul* vormt namen van personen die de eigenschap, in het grondwoord uitgedrukt, bezitten.

8 Tiu libro estas leginda.
Ĉu via urbo estas vidinda?
Estas konsilinde, bone studi tiujn
lecionojn.
Bedaŭrinde, mi ne povos veni.

*Dat boek is lezenswaard.
Is uw stad bezienswaardig.
Het is aan te bevelen, die lessen
goed te bestuderen.
Jammer, ik zal niet kunnen komen.*

Het achtervoegsel *-ind* betekent: waard om te worden

9 *Lernu:*

riĉulo	<i>rijke</i>	ŝtelisto	<i>dief</i>
malriĉulo	<i>arme</i>	eraro	<i>vergissing, fout</i>
blindulo	<i>blinde</i>	persono	<i>persoon</i>
mutulo	<i>stomme</i>	mensogulo	<i>leugenaar</i>
surdmutulo	<i>doofstomme</i>	grandegulo	<i>reus</i>
sperto	<i>ervaring</i>	avarulo	<i>gierigaard</i>
spertulo	<i>deskundige</i>		
arĝento	<i>zilver</i>	sperta	<i>ervaren</i>
fero	<i>ijzer</i>	oro	<i>goud</i>
akompani	<i>vergezellen</i>	avara	<i>gierig</i>
aserti	<i>beweren</i>	ĝentila	<i>beleefd</i>

certigi	verzekeren (zeker maken), betuigen	alia	ander
asekuri	verzekeren (tegen brand enz.)	konsilinda	aanbevelenswaardig
pravi	gelijk hebben	leginda	lezenswaard
sperti	ondervinden	vidinda	bezienswaardig
kompati	medelijden hebben met	admirinda	bewonderenswaardig
konsili	aanraden	kompatinda	beklagenswaardig
bedaŭri	betreuren	bedaŭrinda	betreurenswaardig
ŝteli	stelen	bedaŭrinde	jammer
renkonti	ontmoeten	alie	anders, op andere wijze
mensogi	liegen	tiu	die
supozi	veronderstellen	iu	iemand, een of ander
montri	tonen, laten zien	iuj	enige(n)
admiri	bewonderen	ĉiu	ieder, iedereen
ora	gouden	ĉiuj	alle(n)
arĝenta	zilveren	neniu	niemand, geen enkele
fera	ijzeren		
blinda	blind		
surda	doof		
muta	stom		
surdmuta	doofstom		

Mi kore dankas vin!
Nedankinde!
Kiu volas, tiu povas.
Kiu vivos, tiu vidos.

*Ik dank je hartelijk (vriendelijk)!
Niet te danken! Tot je dienst!
Willen is kunnen.
Wie dan leeft, die dan zorgt.*

10 Respondu:

Ĉu tiu libro estas leginda? Ĉu en via familio estas blindulo? Kio estas grandegulo? Ĉu en via urbo troviĝas vidindaj domoj? Kio estas surdmutulo? Ĉu surdulo povas bone aŭdi? Ĉu vi kompatas surdulon? Ĉu ĉiu riĉulo estas feliĉa? Ĉu oni kredas mensogulon? Ĉu iu homo scias ĉion. Ĉu vi ofte faras erarojn? Ĉu avarulo amas la monon? Ĉu oni ofte vidas oran monon? Ĉu malriĉulo estas riĉa persono?

11 Invullen (korelativoj):

..... mensogas, estas mensogulo. Mi ne konas la viron, staras tie.
Ĉu vi ŝatas la libron, vi legis?, vi diras, ne estas vera. Mi ne kredas, li diris. Mi montros al vi i....., vi ne konas. Nen....., estis en la ĉambro, kredis lin. La plumo, falis sur la plankon, estas mia.
Pri knabo vi parolas? Mi ne konis knabon, renkontis min. Mi ne povis vidi, kuŝis sur la tablo. Kun vi vojaĝis? La viro, kun mi promenis, estas mia onklo.

12 Vertalen en terugvertellen № 1.

13 Rakontu pri via hundo.

LES 16

1 Legu:

Kiom da ovoĵ?

Iu kamparanino iris al la urbo kun korbo da ovoĵ por vendi ilin al la urbaj sinjorinoj.

Unue ŝi vendis kvar kvinonojn de la tuta nombro kaj kvinonan ovon. Poste ŝi iris al la dua klientino kaj tie ŝi vendis tri kvaronojn de la restaĵo kaj kvaronan ovon. Al la tria sinjorino ŝi vendis du trionojn de la nova restaĵo kaj trionan ovon. Fine ŝi vendis la duonon de la lasta restaĵo kaj duonan ovon kaj vidis, ke la korbo estas malplena. Ĉu vi povas kalkuli, kiom da ovoĵ ŝi alportis al la urbo?

- | | |
|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 2 La duoblo de tri estas ses.
Inter ambaŭ ĉambroj estas duobla pordo.
Kvinoble kvar estas dudek.
Sesfoje dek tri estas sepdek ok. | <i>Het dubbele van drie is zes.
Tussen de beide kamers is een dubbele deur.
Vijfmaal vier is twintig.
Zesmaal dertien is achtenzeventig.</i> |
|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Het achtervoegsel *-obl* duidt een veelvoud aan. In vermenigvuldigingen kan ook *foje* gebruikt worden, doch er is verschil tussen:

Mi pagis duoble. Mi pagis dufoje.	<i>Ik heb dubbel betaald. Ik heb twee keer betaald.</i>
--------------------------------------	-------------------------------------------------------------

- | | |
|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 3 La duono de dek ses estas ok.
Dek kvin minutoj estas kvarona horo (kvaronhoro).
Mi aŭskultis nur duone.
Dudek estas kvin sesonoj de dudek kvar. | <i>De helft van zestien is acht.
Vijftien minuten is éénvierde uur (kwartier).
Ik luisterde maar half.
Twintig is vijfzesde van vierentwintig.</i> |
|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Het achtervoegsel *-on* duidt een fractie aan.

- | | |
|----------------------------------------------------------------|------------------------------------------------------------------------------------|
| 4 Hieraŭ ni estis sesope.
La knaboj marŝis po tri.
drie. | <i>Gisteren waren we met z'n zessen.
De jongens marcheerden drie aan drie.</i> |
|----------------------------------------------------------------|------------------------------------------------------------------------------------|

Het achtervoegsel *-op* duidt een verzameling aan; *po* gevolgd door een telwoord geeft een groepering aan.

- | | |
|------------------------------------------------------------------------------------|-----------------------------------------------------------------------|
| 5 Tridek dividite per tri estas dek.
Ok pomoj dividite per kvar estas du pomoj. | <i>30 : 3 = 10.
Acht appels gedeeld door vier is twee appels.</i> |
|------------------------------------------------------------------------------------|-----------------------------------------------------------------------|

Tri kvaronoj de ok dek-trionoj estas ses dek-trionoj.
 Sep dudekonoj dividite per tri okonoj estas dek kvar dek-kvinonoj.
 Unu kvarono estas dudek kvincentonoj.

$$\frac{3}{4} \times \frac{8}{13} = \frac{6}{13}.$$

$$\frac{7}{20} : \frac{3}{8} = \frac{14}{15}$$

$$\frac{1}{4} = 0,25$$

Als een getal uit een aantal eenheden en een breuk bestaat (b.v. $7 \frac{5}{8}$), dan wordt bij het lezen *kaj* gebruikt. Dus, *sep kaj kvin okonoj*. Zo ook $1 \frac{3}{4} = \text{unu kaj tri kvaronoj}$.

Opm.: Als de teller van de breuk 1 is, wordt deze niet genoemd. Het is overbodig, want het enkelvoud van de noemer geeft al aan dat de teller 1 is.

Dus: $3 \frac{1}{4} = \text{tri kaj kvarono}$, $1 \frac{1}{2} = \text{unu kaj duono}$.

6 Viaj ciferoj ne estas legeblaj.
 Tiuj fruktoj ne estas manĝeblaj.
 Ĉu tiu tasko estos ebla por li?
 Lia klarigo estas nekomprenebla.
 Ĉu vi eble vidis mian amikon?
 Estas neeble kredi lin.
 Kompreneble ni amas nian patrinon.

*Uw cijfers zijn niet leesbaar.
 Die vruchten zijn niet eetbaar.
 Zal die taak mogelijk zijn voor hem?
 Zijn verklaring is onbegrijpelijk.
 Heb je misschien mijn vriend gezien?
 Het is onmogelijk hem te geloven.
 Vanzelfsprekend (natuurlijk)
 houden wij van onze moeder.*

Het achtervoegsel *-ebl* duidt aan, dat iets gedaan kan worden.

7 Lernu:

kampo	<i>veld, akker</i>	fruktarbo	<i>vruchtboom</i>
kamparo	<i>platteland</i>	tasko	<i>taak</i>
kamparano	<i>buitenman, boer</i>	klarigo	<i>verklaring</i>
kamparanino	<i>boerin</i>	sumo	<i>som</i>
korbo	<i>mand</i>	diferenco	<i>verschil</i>
kliento	<i>klant</i>	kvociento	<i>quotiënt</i>
restaĵo	<i>rest</i>	produĉo	<i>product (rekenk.)</i>
fino	<i>einde</i>	produkto	<i>voortbrengsel</i>
duoblo	<i>tweevoud</i>	adicio	<i>optelling</i>
duono	<i>helpt</i>	subtraho	<i>afrekking</i>
kvaronhoro	<i>kwartier</i>	multipliko	<i>vermenigvuldiging</i>
kvaronjaro	<i>kwartaal</i>	divido	<i>deling</i>
fojo	<i>keer, maal</i>	cifero	<i>cijfer</i>
frukto	<i>vrucht</i>	fini	<i>eindigen</i>
kalkuli	<i>(uit)rekenen</i>	aŭdebla	<i>hoorbaar</i>
marŝi	<i>marcheren</i>	komprenebla	<i>begrijpelijk</i>
multipliki	<i>vermenigvuldigen</i>	ebla	<i>mogelijk</i>
dividi	<i>delen</i>	eble	<i>misschien</i>

diferenci	<i>verschillen</i>		
duobla	<i>dubbel</i>	kompreneble	} <i>vanzelfsprekend</i> <i>natuurlijk</i> <i>tenslotte, aan</i> <i>het eind</i> <i>eens</i> <i>vaak, dikwijls</i>
duona	<i>half</i>		
legebla	<i>leesbaar</i>	fine	
mangebla	<i>eetbaar</i>	foje	
videbla	<i>zichtbaar</i>	multfoje	

Komenco bona, laboro duona.	<i>Een goed begin is het halve werk.</i>
Li kapjesis.	<i>Hij knikt van ja.</i>
Ŝi kapneas.	<i>Zij schudt van neen.</i>
Flanken!	<i>Opzij!</i>
Dekstren!	<i>Rechtsaf!</i>

8 Respondu:

Kiom estas la kvinon de mil? Ĉu la sesoblo de ok estas pli ol la okoblo de ses? Kiom da monatoj estas en kvaronjaro? Ĉu sep estas la okono de sesdek? Kio estas la dekonon de metro? Kio estas la centoblo de cendo? Ĉu kvaronhoro havas tridek minutojn? Kiom da kvaronhoroj estas tri horoj? Kiom da centonoj estas tri kvaronoj? Ĉu okfoje kvin kvaronoj estas dek? Kiom estas la sesoblo de sepono? Kiom estas la triono de unu kaj duono? Kiom estas la diferenco inter miliono kaj milono?

9 Uitrekenen en in woorden schrijven:

3 x 24 =	11 x 23 =	38 : 2 =	360 : 12 =
5 x 36 =	25 x 16 =	75 : 5 =	480 : 24 =
8 x 42 =	12 x 71 =	150 : 6 =	625 : 25 =
6 x 17 =	22 x 45 =	96 : 8 =	900 : 30 =
9 x 48 =	35 x 20 =	147 : 7 =	840 : 21 =

10 In woorden schrijven:

$\frac{3}{8}$; $\frac{4}{11}$; $\frac{7}{15}$; $\frac{8}{21}$; $1\frac{14}{25}$; $3\frac{27}{32}$; $12\frac{36}{49}$; $28\frac{53}{54}$;
0,3; 0,87; 0,25; 0,18; 1,12; 7,23; 18,25; 39,275.

11 Vertalen en terugvertellen N^o 1.

12 Rakontu, kion vi faras en la lernejo.

LES 17

1 Legu:

Se mi estus riĉa!

Se mi estus riĉa, mi vojaĝus tra la tuta mondo. Mi vizitus ĉiujn landojn, kaj mi parolus kun multaj homoj. Tio estus ebla nur, se ankaŭ ili scius Esperanton. Ni parolus pri niaj kutimoj, pri nia ĉiutaga vivo. Ni bone komprenus unu la alian kaj ni spertus, ke ne estas granda diferenco inter la homoj de diversaj landoj. Ili ĉiuj amas la pacon kaj malamas la militon. Ili tute ne ŝatas militi unu kontraŭ la aliaj. Sed mi ne estas riĉa, do mi ne vojaĝas tra la mondo. Ne ĉiuj homoj jam scias Esperanton, do se mi vojaĝus tra la mondo, mi tamen ne povus paroli kun ĉiuj homoj.

- | | |
|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 2 Se mi havus pomon, mi donus la duonon al vi.
Se vi bone studus, vi certe sukcesus.
Se ĉiuj homoj estus saĝaj, la mondo estus paradizo. | <i>Als ik een appel had, zou ik de helft aan jou geven.
Als je goed studeerde, zou je zeker slagen.
Als alle mensen wijs waren, zou de wereld een paradijs zijn.</i> |
|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

De werkw. uitgang *-us* vormt de *voorwaardelijke wijs* en wordt dus gebruikt om aan te duiden, dat een handeling *zeker niet* of *waarschijnlijk niet* plaatsvindt.

- | | |
|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 3 Se mi ricevos pomon, mi donos la duonon al vi.
Se vi bone studos, vi certe sukcesos.
Se vi volas, vi povas resti. | <i>Als ik een appel krijg, zal ik jou de helft geven.
Als je goed studeert, zul je zeker slagen.
Als je wilt, mag je blijven.</i> |
|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Indien er sprake is van een voorwaarde die in vervulling kan gaan, mag *-us* dus niet gebruikt worden.

- 4 Let op het verschil tussen *-us* en *-os* en ook tussen *se* en *kiam*:

- | | |
|--------------------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------|
| Se li morgaŭ venus, vi vidus lin. | <i>Als hij morgen zou komen, zou je hem zien. (maar hij komt niet)</i> |
| Se li morgaŭ venos, vi vidos lin. | <i>Als hij morgen komt, zul je hem zien. (er is kans, dat hij komt)</i> |
| Kiam li morgaŭ venos, vi vidos lin. | <i>Wanneer hij morgen komt, zul je hem zien. (hij komt zeker)</i> |
| 5 Ĉu vi volus helpi min?
Ĉu vi povus montri al mi la vojon al la stacidomo? | <i>Zou je me willen helpen?
Zou u me de weg naar het station kunnen wijzen?</i> |

De *-us*-vorm wordt ook gebruikt als een beleefdheidsvorm, vooral wanneer men iets verzoekt.

6 Mi tranĉas la pomon per mia tranĉilo. La ĉarpentisto uzas multajn ilojn: borilojn, segilojn, rabotilojn, fajlilojn. La servistino metas la manĝilaron sur la tablon. La birdo flugas per la flugiloj, la fiŝo naĝas per la naĝiloj.	<i>Ik snijd de appel met mijn mes. De timmerman gebruikt veel gereedschappen: boren, zagen, schaven, vijlen. Het dienstmeisje legt het eetgerei op de tafel. De vogel vliegt met de vleugels, de vis zwemt met de vinnen.</i>
------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Het achtervoegsel *-il* vormt de naam van een werktuig, instrument of middel, waarmee iets gedaan wordt. Zelfstandige naamwoorden met *-ilo* zijn afgeleid van werkwoordelijke wortels; de wortels *bor'*, *seg'*, *rabot'* en *fajl'* hebben dus werkwoordelijke betekenis.

Daarentegen hebben de wortels *martel'* en *broso'* de betekenis van zelfstandige naamwoorden: *martelo* – hamer en *broso* – borstel. Hiervan worden de werkwoorden *marteli* – hameren en *brosi* – borstelen afgeleid.

Het kan dus voor de woordafleiding nodig zijn om in het woordenboek na te gaan of een wortel verbale of substantivische betekenis heeft.

7 Lernu:

kutimo	<i>gewoonte</i>	forko	<i>vork</i>
vivo	<i>leven</i>	kulero	<i>lepel</i>
milito	<i>oorlog</i>	telero	<i>bord</i>
sukceso	<i>succes</i>	supo	<i>soep</i>
paradizo	<i>paradijs</i>	saŭco	<i>saus, jus</i>
tranĉilo	<i>mes</i>	plugilo	<i>ploeg</i>
ĉarpentisto	<i>timmerman</i>	erpilo	<i>eg</i>
borilo	<i>boor</i>	balailo	<i>bezem</i>
segilo	<i>zaiag</i>	stacidomo	<i>station</i>
rabotilo	<i>schaaf</i>	martelo	<i>hamer</i>
fajlilo	<i>vijl</i>	broso	<i>borstel</i>
servisto	<i>dienaar, knecht</i>	frizisto	<i>kapper</i>
servistino	<i>dienstmeisje</i>	tondilo	<i>schaar</i>
manĝilaro	<i>eetgerei</i>	razilo	<i>scheermes</i>
flugilo	<i>vleugel</i>	saĝulo	<i>wijze, geleerde</i>
naĝilo	<i>vin</i>	kontraŭulo	<i>tegenstander</i>

ŝlosilo	<i>sleutel</i>	razi	<i>scheren</i>
tondi	<i>knippen</i>	segi	<i>zagen</i>
uzi	<i>gebruiken</i>	raboti	<i>schaven</i>
plugi	<i>ploegen</i>	fajli	<i>vijlen</i>
erpi	<i>eggen</i>	servi	<i>dienen</i>
semi	<i>zaaien</i>	ŝlosi	<i>sluiten</i>
marteli	<i>hameren</i>	balai	<i>vegen</i>
kutimi	<i>gewoon zijn</i>	diversaj	<i>verscheidene</i>
militi	<i>oorlogvoeren</i>	ĉiutaga	<i>dagelijks</i>
sukcesi	<i>slagen</i>	saĝa	<i>wijs</i>
ĉarpenti	<i>timmeren</i>	kontraŭ	<i>tegen</i>
bori	<i>boren</i>		

Ora ŝlosilo ĉion malfermas.
Nova balailo bone balaas.

*Voor geld is alles te koop.
Nieuwe bezems vegen schoon.*

8 Respondu:

Ĉu ĉarpentisto uzas tondilon? Per kio la kamparano plugas? Kion vi faras per ŝlosilo? Kion la kuiristino metas en la supujon? Kio estas en la saŭcujo? Ĉu vi manĝas la terpomojn per kulero? Ĉu la frizisto razas per tondilo? Kion vi faras per tondilo? Ĉu ĉevalo havas flugilojn? Kiu besto havas naĝilojn? Por kio la kamparano uzas erpilon? Kion vi faras per tranĉilo? Ĉu forko estas manĝilo? Kio estas saĝulo? Kio estas kontraŭulo?

9 Invullen (-inda, -inde, -ebla, -eble).

Tiu muzeo estas tre vid.....; ĝi estas vizit..... ĉiutage. Vi devas skribi pli bone; tiuj ciferoj ne estas leg..... Ĉu lia klarigo estas kompren.....? Estas kompren....., ke ne ĉiuj libroj estas leg..... Ĉu tiuj malgrandaj prunoj jam estas manĝ.....? Estas konsil....., ne manĝi ilin. Ĉu vi manĝis ilin? Tiu multipliko ne estas por junaj lernantoj.

10 Vertalen en terugvertellen № 1.

11 Rakontu, kion vi farus, se vi estus riĉa.

LES 18

1 Legu:

Ĉe la librovendisto.

“Bonan matenon, sinjoro! Kion vi deziras?”

“Bonan tagon, sinjoro! Mi volas aĉeti libron.”

“Volonte, sinjoro. Kiun libron vi deziras?”

“Mi mem ne scias. Bonvolu montri kelkajn al mi.”

“Sed kian libron vi deziras, sinjoro? Ĉu nederlandan, francan.....?”

“Kompreneble Esperantan libron. Ĉu vi vendas tiajn librojn?”

“Certe, sinjoro! Mi vendas ĉiajn librojn, do ankaŭ Esperantajn. Kian Esperantan libron vi deziras, ĉu lernolibron aŭ legolibron?”

“Mi preferas legolibron, sed ne tro malfacilan, mi petas.”

“Jen mi havas kelkajn por vi. Nun vi povas elekti.”

“Mi supozas, ke tiu libro taŭgas por mi, 'Legolibro por komencantoj'. Kio estas la prezo?”

“Tio estas belega, facila legolibro; do ĝi estas tia, kian vi serĉas. La prezo estas unu eŭro kaj kvindek cendoj.”

“Tio ne estas multekosta; mi aĉetos tiun.”

“Mi enpakos ĝin por vi. Ĉu vi kunportos ĝin, aŭ ĉu mi sendu ĝin al via hejmo?”

“Donu ĝin al mi. Jen la mono. Bonan tagon, sinjoro!”

“Dankon, sinjoro! Ĝis revido!”

2 Kian vinon vi preferas,
ruĝan aŭ blankan?
Tia konduto ne estas ĝentila.

Ĉu vi havas ian krajonon por mi?
Ĉia kraiono estas bona por mi.
Mi trinkas nenian vinon.

*Wat voor wijn verkiest u,
rode of witte?*

*Zo'n (een dergelijk) gedrag is niet
beleefd.⁵*

Heb je een of ander potlood voor me?

Elk soort potlood is goed voor me.

Ik drink geen enkele soort wijn.

De korelativoj op *-a* duiden de hoedanigheid aan; ze worden geheel behandeld als bijvoeglijke naamwoorden en kunnen dus *-n*, *-j* of *-jn* krijgen.

3 Vergelijk:

Kiu viro estas via onklo?
Kia viro estas via onklo?
Tiun libron mi ne legis.
Tian libron mi ne legis.
Donu al mi iun plumon.

Welke man is je oom?

Wat voor een man is je oom?

Dat boek heb ik niet gelezen.

Zo'n boek heb ik niet gelezen.

Geef me een pen.

⁵ In andere zinnen kan *tia* worden vertaald met *zo'n*, *zodanig* of *dusdanig*, of met: *dat -*, *zo'n -* of *zulk 'n soort (of slag)* en dergelijke.

Donu al mi ian plumon.
Ĉiuj homoj povas lerni
Esperanton.
Ĉiaj homoj jam parolas
Esperanton.

*Geef me een of andere pen.
Alle mensen kunnen Esperanto leren.
Allerlei mensen spreken al Esperanto.*

4 Ankaŭ mi aĉetis tian fontoplumon,
kian vi havas.
Mi ne ŝatas tiajn seĝojn, kiaj
staras en via ĉambro.
Tiaj ŝuoj, kiajn vi havas,
ne plaĉas al mi.

*Ik heb ook zo'n vulpen gekocht,
als jij hebt.⁶
Ik houd niet van zulke stoelen,
als er in uw kamer staan.
Zulke schoenen als jij hebt,
bevallen mij niet.*

Als betrekkelijk voornaamwoord moet meestal *kia* gebruikt worden na een antecedent met *tia*. Vergelijk echter:

Tiajn knabojn, *kiuj* ĉion kuraĝas,
ni bezonas.

*Zulke jongens die alles durven,
hebben wij nodig.*

5 *Kia* vetero!
Kiaj homoj!
Kiom da homoj!
Kiaj hundoj!
Kiom da hundoj!

*Wat een weer! (mooi, lelijk)
Wat een mensen! (onaangenaam b.v.)
Wat een mensen! (veel)
Wat een honden (grote, lelijke b.v.)
Wat een honden (veel)*

In uitroepen wordt *kia* gebruikt voor de hoedanigheid, *kiom* voor de hoeveelheid.

6 *Kiam* neĝas, la neĝeroj falas sur
la teron.
Ĉu ĉiuj moneroj estas rondaj?
La maro konsistas el akveroj.
Mia fingro doloras; estas
lignero en ĝi.

*Als het sneeuwt, vallen de
sneeuwvlokken op de aarde.
Zijn alle munten rond?
De zee bestaat uit waterdruppels.
Mijn vinger doet pijn;
er zit een splinter in.*

Het achtervoegsel *-er* vormt de namen der eenheden waaruit iets bestaat.

6 **Ankaŭ** - en ook **ne** - behoren te staan voor datgene, waarop zij betrekking hebben.
Verg.: *Ankaŭ/Ne mi aĉetis fontoplumon en Amsterdamo; Mi ankaŭ/ne aĉetis fontoplumon en Amsterdamo; Mi aĉetis ankaŭ/ne fontoplumon en Amsterdamo; Mi aĉetis fontoplumon ankaŭ/ne en Amsterdamo.*

7 Lernu:

lernolibro	<i>leerboek</i>	lago	<i>meer</i>
legolibro	<i>leesboek</i>	lageto	<i>vijver</i>
komencanto	<i>beginner</i>	ligno	<i>hout</i>
vino	<i>wijn</i>	lignero	<i>splinter</i>
konduto	<i>gedrag</i>	fajro	<i>vuur</i>
fonto	<i>bron</i>	fajrero	<i>vonk</i>
fontoplumo	<i>vulpen</i>	monero	<i>munten, geldstuk</i>
kuraĝo	<i>moed</i>	plado	<i>schaal</i>
neĝero	<i>sneeuwvlok</i>	pladeto	<i>schoteltje</i>
pluvero	<i>regendruppel</i>	kuko	<i>koek</i>
hajlero	<i>hagelsteen</i>	buterpano	<i>boterham</i>
akvero	<i>waterdruppel</i>	bulko	<i>kadetje, broodje</i>
maro	<i>zee</i>	gusto	<i>smaak</i>
odoro	<i>geur</i>	komenci	<i>beginnen</i>
kelo	<i>kelder</i>		<i>(overg.)</i>
koridoro	<i>gang</i>	enpaki	<i>inpakken</i>
mato	<i>mat</i>	kunporti	<i>meenemen</i>
tuko	<i>doek</i>	plaĉi	<i>bevallen</i>
tapiŝo	<i>tapijt</i>	dolori	<i>pijn doen</i>
doloro	<i>pijn, smart</i>	korekti	<i>verbeteren</i>
ŝtupo	<i>trede</i>	odori	<i>geuren</i>
ŝtuparo	<i>trap</i>	tia	<i>zo'n, dergelijk</i>
kurteno	<i>gordijn</i>	ia	<i>enigerlei</i>
bufedo	<i>buffet</i>	ĉia	<i>allerlei</i>
tablotuko	<i>tafellaken</i>	nenia	<i>generlei</i>
kuraĝi	<i>durven</i>	nederlanda	<i>Nederlands</i>
preferi	<i>verkiezen, de voorkeur geven aan</i>	franca	<i>Frans</i>
		multekosta	<i>duur</i>
		bonodora	<i>geurig</i>
peti	<i>verzoeken</i>	kuraĝa	<i>moedig</i>
elekti	<i>kiezen</i>	volonte	<i>graag</i>
taŭgi	<i>deugen, geschikt</i>	nun	<i>nu</i>
	<i>zijn</i>	jen	<i>ziehier, hier is</i>

Kia ago, tia pago.

Kia patro, tia filo.

Kia patrino, tia filino.

Boontje komt om zijn loontje.

De appel valt niet ver van de boom.

8 Respondu:

Kiam falas neĝeroj? Kiom da akveroj estas en glaso da akvo? Ĉu eŭro estas franca monero? Kiam kraĵonon vi havas? Ĉu vi ŝatas ruĝan vinon? Kion vi preferas, teon aŭ kafon? Ĉu vi ŝatas ĉiajn legomojn? Ĉu Esperanto plaĉas al vi? Ĉu lago estas pli granda ol maro? Kia akvo estas en maro? Ĉu vi ofte naĝis en la maro? Ĉu oni konstruas meblojn el ligno? Kie estas viaj moneroj? Ĉu fonto-

plumo taŭgas por malgranda infano? Per kia krajono la instruisto korektas la erarojn? Ĉu ĉiuj floroj odoras bone? Per kio vi flaras la rozojn? Ĉu ĉiaj fruktoj estas bongustaj?

9 *Kio estas:*

plenkreskulo; kombilo; sukerero; skribilo, skribilaro; belulino; grizharulo; bonulo; brunulino; barbulo; fremdulo; helpilo; gejunuloj; kaptilo; panero; bonkorulo; ludilo; montrilo; precizulo; subulo.

10 Vertalen en terugvertellen № 1.

11 Rakontu pri via matenmanĝo.

LES 19

1 Legu:

Kiu mensogis?

Iu soldato venis al sia kapitano kaj petis kelktagan forpermeson. Li rakontis, ke li ricevis leteron de sia edzino, en kiu ŝi skribis al li, ke ŝi havas tre multe da laboro en la butikoj: venas multe da klientoj kaj ŝi tre bezonas lian helpon. La kapitano atente aŭskultis lian rakonton, sed respondis, ke li ne povas plenumi lian peton. “Ankaŭ mi”, li diris, “ricevis leteron de via edzino kaj ŝi skribis al mi, ke mi ne donu forpermeson al ŝia edzo, kiam li petas pri tio, ĉar hejme li estas nur malhelpo; do ŝi preferas, ke li restu en la soldatejo.” La soldato diris nenion, salutis kaj foriris. Sed ĉe la pordo li subite turnis sin kaj diris: “Sinjoro kapitano, mi tre bedaŭras, ke en nia regimento estas du mensoguloj. Mi estas unu el ili, ĉar mi tute ne havas edzinon.”

2 Kie estas mia plumo? Ĉu ĝi kuŝas tie? Ĝi devas esti ie. Mi jam serĉis ĉie. Sed mi vidas ĝin nenie.	<i>Waar is mijn pen? Ligt hij daar? Hij moet ergens zijn. Ik heb al overal gezocht. Maar ik zie hem nergens.</i>
------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

De korelativoj op *-e* duiden een plaats aan.

3 Kien vi iras? Ne iru tien! Via frato kuris ien, sed mi ne scias kien. La knabo rigardis ĉien. Mi estas laca; mi promenas nenien.	<i>Waar ga je heen? Ga daar niet heen! Je broer is ergens heen gehold, maar ik weet niet waarheen. De jongen keek overal heen. Ik ben moe; ik wandel nergens heen.</i>
------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

De korelativoj op *-e* zijn bijwoorden, dus onveranderlijk, behalve dat ze de richtings-*n* kunnen krijgen.

4 Mi ne konas la urbon, kie vi loĝas. Tie estas la vilaĝo, kien ni iras. Ĉu tio estas la domo, en kiu vi loĝas?	<i>Ik ken de stad niet, waar je woont. Daar is het dorp, waar we heen gaan. Is dat het huis, waarin je woont?</i>
-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Kie is bijwoord, *kiu* is voornaamwoord.

5 Tio estas libro, kaj ĉi tio estas kreto.	<i>Dat is een boek en dit is een krijtje.</i>
--------------------------------------------	-----------------------------------------------

Tiu domo estas via, kaj ĉi tiu estas mia.
Tie estas via domo, kaj ĉi tie estas mia.

Dat huis is het uwe, en dit is het mijne.

Daar is uw huis, en hier is het mijne.

Om bij de korelativoj *tio*, *tiu*, en *tie* verschil te maken, als ze betrekking hebben op veraf en dichtbij, zetten we *ĉi* ervoor (of erachter) als het betrekking heeft op iets dat dichtbij is.

6 La ovo staras en la ovingo.

La patrino uzas fingringon, kiam ŝi kudras.

Kie estas la cigaringo de la patro?

Prenu plumon el la plumujo kaj metu ĝin en la plumingo.

Het ei staat in het eierdopje.

Moeder gebruikt een vingerhoed als ze naait.

Waar is vaders sigarenpijpje?

Neem een pen uit het pennendoosje en steek hem in de penhouder.

Het achtervoegsel *-ing* duidt een voorwerp aan, dat één ander voorwerp gedeeltelijk omvatten kan.

7 Lernu

soldato	soldaat	promeso	belofte
soldatejo	} kazerne	robo	japon
kazerno		jupo	rok
kapitano		bluzo	blouse
permeso	toestemming	mentono	kin
forpermeso	verlof	lipo	lip
peto	verzoek	vango	wang
malhelpo	hinderpaal, belemmering	ŝultro	schouder
regimento	regiment	famo	roem
edzo	echtgenoot	kandelo	kaars
edzino	vrouw, echtgenote	permesi	toestaan
ovingo	eierdopje	plenumi	vervullen
fingringo	vingerhoed	kudri	naaien
cigaringo	sigarenpijpje	promesi	beloven
plumingo	penhouder	surhavi	dragen
kudrilo	naald		(van kleren)
pinglo	speld	surmeti	aantrekken,
trikilo	breinaald		opzetten
kuraci	genezen	demeti	uittrekken,
akcepti	aannemen, ontvangen	seka	afzetten
	rechtspreken, oordelen	fama	droog
juĝi		stulta	beroemd
			dom

dekstra	<i>rechter (rechts bevindend)</i>	ie	<i>ergens</i>
maldekstra	<i>linker</i>	ĉie	<i>overal</i>
grava	<i>belangrijk</i>	nenie	<i>nergens</i>
		ĉirkaŭ	<i>rondom</i>

Kie estas volo, tie estas vojo.

Waar een wil is, is een weg.

8 Respondu:

Kie estas via domo? Kien vi iras dimanĉe? Kie laboras la kuiristo? Kie vi lernas Esperanton? Kiu vin instruas? Kion vi metas en la cigaredingon? Kie estas viaj plumoj? Per kio la patrino trikas? Pro kio vi estas malseka? Ĉu akvero estas granda? Kiam falas hajleroj? En kia ĝardeno kreskas legomoj? Kia homo estas via avo? Kiu homo bakas la panon? Kie li bakas? Kiu vendas librojn? Kie staras multaj arboj? Ĉu viro surhavas robon? Kie estas via mentono? Kiam vi demetas la ĉapelon? Kiom da lipoj vi havas?

9 Invullen (-er, -ing, -uj, -ul):

La servistino forbalaas la pan...ojn per bala...o. La patrino uzas kudr...ojn, tri...ojn kaj fingr...on. La patro havas kvin cigarojn en sia cigar...o. Li uzas cigar...on por fumi cigaron. Por skribi oni metas plumon en plum...on. Poste oni metas la plumojn denove en la plum...on. Mia frato estas maldekstr...o. Neĝ...o estas ofte pli granda ol hajl...o. Mi estas malseka pro la pluv...oj. Mi havas neniun mon...on en mia mon...o. Sur la ĉapo de la ĉarpentisto kuŝas lign...oj. Kiu faris multajn erarojn, tiu estas stult...o.

10 Kio estas:

kuracisto; stultulo; akceptejo; juĝisto; kuracilo; atendejo; gravulo; nekuracebla; juĝistaro; malseka; feliĉulo; akceptebla; cigaredingo; juĝejo; preferinda; elektebla; portebila; ridinda; neforgesebla; eksterulo; maldekstrulo; kandelingo.

11 Vertalen en terugvertellen № 1.

12 Rakontu pri la vetero de hieraŭ.

LES 20

1 Legu:

La leono kaj la muso.

Estis iam leono, kiu estis la reĝo inter la bestoj. Iun tagon ĝi dormis trankvile, kiam subite malgranda muso kuris sur ĝia felo, kaj vekis ĝin. La leono levis la piedon, kaj per sia ungego kaptis la muson kaj volis mortigi ĝin.

La muso petegis pardonon kaj promesis neniam plu ĝeni la reĝan leonon. La leono estis bonhumoro; ĝi pardonis la muson, kiu feliĉega forkuris.

Kelkajn tagojn poste la leono hazarde falis en reton, kiun ĉasisto metis en la densa arbaro por kapti bestojn. La leono vane klopodis sin savi el la danĝero. Tiam ĝi terure blekis, blekegis; kaj la tuta bestaro tremis. Sed la malgranda muso aŭdis la timon en la voĉo de la leono; scivola ĝi alkuris. Kiam ĝi vidis la reton, kiu kaptis la leonon, ĝi tuj komencis mordi la ŝnurojn, kaj post kelkaj horoj la leono povis forkuri. Ĉiam ĝi estis danka pro la helpo de la muso, kaj ĝi neniam plu mortigis malgrandajn bestojn.

- | | |
|----------------------------------|--------------------------------------------------|
| 2 Kiam vi lernis vian lecionon? | <i>Wanneer leer je je les?</i> |
| Tiam mi ne havis tempon. | <i>Toen had ik geen tijd.</i> |
| Iam vi estos lerta esperantisto. | <i>Ooit zul je een bekwaam esperantist zijn.</i> |
| Tiu knabino ĉiam ridas. | <i>Dat meisje lacht altijd.</i> |
| Ĉu ŝi neniam estas malgaja? | <i>Is zij nooit verdrietig?</i> |

De korelativoj op *-am* duiden een tijd aan.

- | | |
|-------------------------------------------------|--------------------------------------------------------------|
| 3 Mi ne estis hejme, kiam vi venis. | <i>Ik was niet thuis, toen je kwam.</i> |
| Mi sopiras al la tago, kiam vi venos. | <i>Ik verlang naar de dag, dat je komen zult.</i> |
| Li estis tre feliĉa, post kiam lia amiko venis. | <i>Hij was heel gelukkig, nadat zijn vriend gekomen was.</i> |
| Mi eliros tuj kiam li estos ĉi tie. | <i>Ik ga uit, zodra hij hier is.</i> |

4 Let op het verschil tussen *kiam* en *tiam*:

Mi ne estis hejme, kiam vi venis.	<i>Ik was niet thuis, toen je kwam.</i>
Mi hieraŭ ne estis hejme; tiam venis mia amiko.	<i>Ik was gisteren niet thuis, toen kwam mijn vriend.</i>

- | | |
|---------------------------------------|--------------------------------------------------|
| 5 Mi foriros je la tria (horo). | <i>Ik ga om drie uur weg.</i> |
| Via ĝardeno estas riĉa je floroj. | <i>Uw tuin is rijk aan bloemen.</i> |
| Ĉu vi ofte aĉetas je kredito? | <i>Koop je vaak op krediet?</i> |
| Je mia bedaŭro mi ne povas helpi vin. | <i>Tot mijn leedwezen kan ik je niet helpen.</i> |

Het voorzetsel *je* heeft geen bepaalde betekenis en wordt gebruikt, wanneer men andere voorzetsels niet toereikend acht.

6	Mia amiko venos je lundo.	}	<i>Mijn vriend komt maandag.</i>
	Mia amiko venos lundon.	}	
	Li restos dum tri tagoj.	}	<i>Hij blijft drie dagen.</i>
	Li restos tri tagojn.	}	
	La vojo estas longa je dek kilometroj.	}	<i>De weg is tien kilometer lang.</i>
	La vojo estas longa dek kilometrojn.	}	
	Tiu libro kostas je du eŭroj.	}	<i>Dat boek kost twee euro.</i>
	Tiuj libro kostas du eŭrojn.	}	
	La fiŝo pezis je dudek funtoj.	}	<i>De vis woog twintig pond.</i>
	La fiŝo pezis dudek funtojn.	}	

In bepalingen van *tijd, duur, maat, prijs* en *gewicht* laat men meestal het voorzetsel weg en voegt dan de naamvals-*n* toe. (Vergelijk hiermee ook de richtings-*n* in les 12).

7	Kioma horo estas?	<i>Hoe laat is het?</i>
	Estas la tria (horo).	<i>Het is drie uur.</i>
	Estas duono post la kvara.	<i>Het is half vijf.</i>
	Estas kvarono post la kvina.	<i>Het is kwart over vijf.</i>
	Estas la kvina kaj dek kvin (min.)	<i>Het is 5 uur 15.</i>
	Estas kvarono antaŭ la oka.	<i>Het is kwart voor acht.</i>
	Estas dek (minutoj) post la dua.	<i>Het is tien (minuten) over twee.</i>
	Estas la dua kaj dudek kvin (minutoj).	<i>Het is 2 uur 25.</i>
	Estas dudek kvin post la dua.	<i>Het is vijf (minuten) voor half drie.</i>
	La vagonaro forveturas je la oka kaj kvardek du.	<i>De trein vertrekt om 8 uur 42.</i>

8 Lernu:

reĝo	koning	vagonaro	trein
felo	vacht	dato	datum
ungo	nagel	kalendaro	kalender
ungego	klauw	bovo	rund
pardonono	vergiffenis	pezo	gewicht, zwaarte
ĝeno	last, storing	pesilo	weegschaal
humoro	humeur	pezilo	gewicht
reto	net		(om te wegen)
ĉasisto	jager	horloĝo	klok (uurwerk)
timo	vrees	brakhorloĝo	(pols)horloge
voĉo	stem	ciferplato	wijzerplaat
ŝnuro	touw	ago	daad
bedaŭro	leedwezen	dorno	doorn
kredito	krediet	hazardo	toeval
vagono	wagon	teruro	verschrikking

mortigi	doden	agi	handelen, doen
petegi	smeken	pepi	piepen
ĉasi	jagen	voĉlegi	voorlezen
pardoni	vergeven	levi	(op)heffen
ĝeni	hinderen	veturi	rijden
savi	redden	forveturi	wegrijden, vertrekken
bleki	schreeuwen (van dieren)	trankvila	kalm, rustig
ĉevalbleki	} hinniken	bonhumora	goedgehumeurd
heni		} loeien	feliĉega
bovbleki	} brullen		terura
muĝi		} beven	vana
blekegi	} verlangen		scivola
tremi		} wegen (overgankelijk)	lerta
sopiri	} wegen, zwaar zijn		densa
pesi			hazarde
		iam	ooit, eens
pezi		ĉiam	altijd
		neniam	nooit

Hodiaŭ estas la sesa de oktobro.
Mi forvojaĝos la dekan de novembro.
Amsterdam, la 26-an de majo 2009.

Vandaag is het 6 oktober.
Ik ga 10 november op reis.
Amsterdam, 26 mei 2009.

9 Respondu:

Ĉu rozoj ĉiam havas dornojn? Je kioma horo vi tagmanĝas? Ĉu vi iam vidis leonon? Kiu neniam eraras? Kiom vi pezas? Kiom da montriloj havas via horloĝo? Ĉu kato pepas? Ĉu vi ĉiam estas bonhumora? Ĉu ĉevalo havas ungegojn? Ĉu kato havas dikan felon? Ĉu vi ĝojas, kiam la instruisto voĉlegas belan historion? Kiu dato estas hodiaŭ? Ĉu vi iam ĉasis? Ĉu turhorloĝo estas pli granda ol poŝhorloĝo? Dum kiom da monatoj estas somero?

10 Ĉu -n?

La viro.. portas granda.. fiŝo... Li.. kaptis ĝi.. antaŭ unu horo.. en la kanalo... Tie.. li.. sidis la tuta.. mateno... Dum horoj.. li.. kaptis nenio... Sed nun li.. iras al la butikoj.. por pesi la fiŝo... Li.. supozas, ke ĝi.. pezas dek du kilogramoj... Tio.. estas multa... Ĉu vi.. iam kaptis tia.. fiŝo..? La viro.. estas gaja.., kaj iros hejme.. montri la fiŝo.. al sia.. edzino... Tiu.. kuiros ĝi.. kaj ili.. havos tagmaĝo.. kun fiŝo.. dum tuta.. semajno...

11 Vertalen en terugvertellen № 1.

12 Rakontu pri via laboro dum la tago de horo al horo.

LES 21

1 Legu:

La novaj vestoj de la reĝo.

Iam estis reĝo, kiu ne ŝatis la regadon. Li pli ŝatis belajn vestojn. Por ĉiu horo de la tago li havis alian veston. Tial la tutan tagon li vestadis kaj alivestadis sin. Li neniel zorgis pri sia popolo, sed nur pensadis pri belaj vestoj. Ĉiel li klopodis akiri novajn kostumojn, kiel eble plej belegajn. La zorgadon pri la soldatoj li lasis al siaj ministroj kaj oficistoj. Sed por si mem li elektis ĉiumonate novan uniformon. Du ruzaj viroj iel aŭdis pri tiu reĝo kaj lia amo je belegaj vestoj. Ili decidis profiti tion kaj vojaĝis al lia regno. Ili anoncis, ke ili povas teksti belegan ŝtofon, kiu ne nur plaĉos al la reĝo pro sia koloro kaj desegno, sed ankaŭ havas specialan kvaliton. Neniu homo, kiu estas malsaĝa kaj ne taŭgas por sia ofico, povas vidi tiun ŝtofon.

Kiel ili akiris multan monon per tiu trompado vi povas legi en la fabelo de Andersen "La novaj vestoj de la reĝo".

2 Kiel vi venis ĉi tien, ĉu piede
aŭ bicikle?
Tiel vi neniam povos sukcesi.
Iel mi devas pagi lin.

Ĉiel mi klopodis konvinki lin.

Mi neniel ricevis komunikon.

*Hoe ben je hier gekomen,
te voet of op de fiets?
Zo zul je nooit kunnen slagen.
Op de een of andere manier
moet ik hem betalen.
Op alle manieren trachtte ik hem
te overtuigen.
Op geen enkele wijze heb ik
bericht gekregen.*

De korelativoj op *-el* duiden een wijze, een manier aan.

3 Faru (tiel) kiel mi faris.
Mi sendas la libron kiel presaĵon.
Kiel prezidanto mi bonvenigas
vin ĉiujn.

*Doe zoals ik gedaan heb.
Ik zend het boek als drukwerk.
Als voorzitter heet ik u allen
welkom.*

Om te weten of het zelfst. naamw. na *kiel* al of niet *-n* moet krijgen, make men de zin volledig, b.v.:

Mi akceptos vin kiel amiko
(vin akceptas).

*Ik zal u ontvangen, zoals een vriend
u ontvangt.*

Mi akceptos vin kiel amikon
(mi akceptas).

*Ik zal u ontvangen, zoals ik een
vriend ontvang.*

4 Ĉu vi ĉiam studadas?
Tiu viro laboradas.
La ministro paroladis dum
du horoj.

*Studeer je maar altijd door?
Die man werkt voortdurend.
De minister hield een redevoering
van twee uur.*

Het achtervoegsel *-ad* geeft de duur of herhaling van een handeling aan.

5 Mi ŝatis tiun kantadon.
La sangado de lia brako estis
terura.
Per konstanta klopodado ni
atingos nian celon.
Ni aŭdis la blekadon de la
sovaĝaj bestoj.

*Ik hield van dat zingen.
Het bloeden van zijn arm was
verschrikkelijk.
Door voortdurend te proberen
zullen we ons doel bereiken.
Wij hoorden het brullen van de
wilde dieren.*

Door het achtervoegsel *-ad(o)* wordt een onbepaalde wijs tot zelfstandig naamwoord gemaakt.

6 Lernu:

popolo	volk	averto	waarschuwing
kostumo	kostuum	bildo	beeld, plaat
ministro	minister	aero	lucht (gas)
ofico	ambt	ĉielo	hemel
oficisto	ambtenaar	daŭro	duur (tijd)
uniformo	uniform	ekskurso	uitstapje
profito	voordeel, winst	grupo	groep
decido	besluit, beslissing	gvidisto	gids
regno	rijk	regi	regeren
ŝtofo	stof (weefsel)	alivesti	verkleeden
koloro	kleur	akiri	verkrijgen
kvalito	kwaliteit	atingi	bereiken
desegno	tekening (patroon)	lasi	laten
fabelo	sprookje	profiti	profiteren, benutten
biciklo	fiets	decidi	besluiten, beslissen
anonco	advertentie	anonci	bekend maken
komuniko	mededeling	presaĵo	drukwerk
teksa	weven	desegni	tekenen
prezidanto	voorzitter	trompi	bedriegen
sango	bloed	ruza	slim, sluw
bicikli	fietsen	speciala	speciaal, bijzonder
konvinki	overtuigen	konstanta	voortdurend
komuniki	mededelen	bicikle	per fiets
presi	drukken		
bonvenigi	verwelkomen		

paroladi	een redevoering	piede	te voet
	houden	kiel	hoe
sangi	bloeden	tiel	zo, aldus ⁷
averti	waarschuwen	iel	op een of andere
daŭri	(voort)duren		manier
gvidi	leiden	ĉiel	op elke manier
imagi	zich voorstellen	neniel	op geen enkele
indigni	zich ergeren		manier, geenszins
intenci	van plan zijn		

Hakado de ligno donas lignerojn. *Waar men hakt, vallen spaanders.*

7 Respondu:

Kiel vi iras al la lernejo? Kiel vi fartas? Ĉu vi iel povas flugi? Ĉu vi intencas averti lin? Ĉu vi ŝatas la flavan koloron? Kiel vi desegnis tion? Kiel vi akceptos vian fraton? Kiel vi ricevis tiun komunikon? Ĉu vi ŝatas legi fabelojn? Kiel li konvinkis vin? Ĉu vi ofte alivestas vin? Ĉu vi povas vidi aeron? Ĉu la ĉielo estas alta? Ĉu vi sendis la ĵurnalon kiel presajon? Kiel oni bonvenigis ilin? Kiel vi faris la ekskurson? Ĉu ili profitis per la teksado? Ĉu vi ŝatas rigardi belajn bildojn? Kiel vi akiris tiun ŝtofon? Ĉu vi povas konvinki mian fraton? Ĉu vi iel trompis vian instruiston?

8 Invullen (korelativojn):

Ki... vi fartas? Mi ne fartas ti... bone, ki... mia filo. Ti... knabo estas ti... forta ki... leono. Neni... li estas malsana. Ĉi... estas envia pri ti... sano. Li ĉi... multe laboras, sed neni... estas laca pro ti... Mi neni... povas kompreni ti... Ĉu vi i... aŭdis pri ti... knabo, ki... povas fari ĉi...? Neni... estas pli grava ol laboro, pri ki... oni estas kontenta. Ki... estas via filo? Mi vidas lin neni... Li estas en la ĝardeno. Ti... li prizorgas la florojn. Li bone faras ti..., nen... vi vidas ti... flo-rojn, ki... en nia ĝardeno.

9 Vertalen en terugvertellen № 1.

10 Rakontu pri via biciklado.

⁷ kaj tiel plu, ktp. = enzovoorts, enz.

LES 22

1 Legu:

Amsterdamo, la 15-an de marto 2009.

Estimata Sinjoro,

En la lasta numero de 'Esperanto' mi legis vian anoncon, per kiu vi serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj pri diversaj temoj.

Ĉar mi dum kelka tempo studas la lingvon Esperanto, mi ŝatas praktiki ĝin per korespondado. Mi kelkfoje parolas la lingvon, sed nur kun samlandanoj.

Mi ne estas lerta esperantisto, sed mi esperas, ke iam mi estos tia. Do mi nun skribas al vi ĉi tiun leteron, kaj petas, ke vi estu mia korespondanto.

Pri kiuj temoj vi deziras korespondi? Mi estas instruisto, kaj mi multe ŝatas sporton; do mi proponas, ke ni korespondu pri lernejoj aferoj aŭ pri sporto.

Mi ankaŭ povas sendi bildojn de nia lando, se vi deziras tion.

Samideane salutas vin,

via korespondonto,

J. Helplingvano

2 La lernanto diligente lernas.

La prezidanto malfermas la kunvenon.

Ne ĝenu la parolanton.

De leerling leert ijverig.

De voorzitter opent de vergadering .

Hinder de spreker niet.

-anto vormt van een werkwoord de naam van de persoon, die de werking verricht.

3 Kiu estas la skribinto de la letero?

La sendinto ne skribis sian nomon sur la koverto.

La prezidanto dankis la parolinton.

Ĉu vi konis la mortinton?

Wie is de schrijver van de brief?

De afzender heeft zijn naam niet op de envelop geschreven.

De voorzitter bedankte de spreker.

Heb je de gestorvene gekend?

-into vormt van een werkwoord de naam van de persoon, die de werking verricht heeft.

4 Partoprenontoj bonvolu anonci sin baldaŭ.

La prezidanto bonvenigas la parolonton.

La savonto saltis en la akvon.

Zij die van plan zijn deel te nemen, gelieve zich spoedig te melden.

De voorzitter verwelkomt de spreker.

De redder sprong in het water.

-onto vormt van een werkwoord de naam van de persoon, die de werking verrichten zal.

Men gebruike *-into* en *-onto* alleen, wanneer men uitdrukkelijk te kennen wil geven, dat de handeling tot het verleden of de toekomst behoort.

Let op het verschil tussen:

Estis multaj partoprenantoj.	<i>Er waren veel deelnemers.</i>
Estos multaj partoprenantoj.	<i>Er zullen veel deelnemers zijn.</i>
Estas multaj partoprenintoj.	<i>Er zijn er velen, die deelgenomen hebben.</i>
Estas multaj partoprenontoj.	<i>Er zijn er velen, die zullen deelnemen.</i>
5 La eksdirektoro vizitis nian lernejon.	<i>De oud-directeur bezocht onze school.</i>
La eksreĝo forlasis la landon.	<i>De ex-koning verliet het land.</i>
Hieraŭ mi renkontis mian eksinstruiston.	<i>Gisteren ontmoette ik mijn vroegere onderwijzer.</i>

Het voorvoegsel *-eks* betekent: *vroegere, oud-, ex-*.

6 Lernu:

lingvo	taal	poŝtoŝicejo	postkantoor
temo	onderwerp	telegrafo	telegraaf
sporto	sport	telefono	telefoon
afero	zaak	leterkesto	brievenbus
ideo	idee, denkbeeld	subskribinto	ondergetekende
samideano	geestverwant	korespondado	briefwisseling
koverto	couvert, envelop	poŝtisto	postbode
nomo	naam	pentristo	(kunst)schilder
direktoro	directeur	gardisto	bewaker
naskiĝtago	verjaardag	profesio	beroep
ekzerco	oefening	korespondi	corresponderen
poemo	gedicht	praktiki	in praktijk brengen,
rimarko	opmerking		toepassen
adreso	adres	ĉeesti	aanwezig zijn
poŝtmarko	postzegel	morti	sterven
poŝtkarto	briefkaart	partopreni	deelnemen
fotografi	fotograferen	estimi	achten
verki	schrijven (van een boek)	subskribi	ondertekenen
naskiĝi	geboren worden	telegrafi	telegraferen
ekzerci	oefenen	telefoni	telefoneren
traduki	vertalen	pentri	schilderen
rimarki	(op)merken	gardi	bewaken, bewaren
glui	plakken	aresti	gevangen nemen

stampi	<i>stempelen</i>	precipe	<i>vooral</i>
flui	<i>stromen</i>	Ho!	<i>Oh!</i>
proponi	<i>voorstellen</i>	imagi	<i>zich voorstellen</i>
tempo	<i>tijd</i>		

Estimata Sinjoro.	<i>Geachte heer.</i>
Kara Amiko.	<i>Beste vriend.</i>
Responde al via letero.	<i>In antwoord op uw schrijven.</i>
Ĉi-kune mi sendas al vi.	<i>Ingesloten zend ik u.⁸</i>
Altestime.	<i>Hoogachtend.</i>
Kun koraj salutoj.	<i>Met hartelijke groeten.</i>

7 *Respondu:*

Kiom da lernantoj havas via instruisto? Kaj kiom da lernintoj? Kio estas parolonto? Kio estas kantanto? Kio estas kantistino? Ĉu ĉiu dancanto estas dancisto? Kiu lernas en la lernejo? Kiu instruas? Ĉu vi havas multajn korespondantojn? Kiu estas la sendinto de tiu letero? Kiam estas via naskiĝdato? Ĉu mortinto povas paroli? Ĉu fumonto fumas? Ĉu vi estas la skribinto de tiu ekzerco? Ĉu li estas la verkinto aŭ la tradukinto de tiu poemo? Kio estas arestanto? Kio estas arestinto?

8 *Kio estas la diferenco inter:*

skribisto, skribanto, skribinto kaj skribonto?	
gvidisto kaj gvidanto?	vendisto kaj vendinto?
instruisto kaj instruanto?	mortanto, mortinto kaj mortonto?
fotografisto kaj fotografanto?	verkisto kaj verkinto?
teksisto kaj teksanto?	servisto kaj servanto?
kantistino kaj kantantino?	juĝisto, juĝanto kaj juĝonto?
pentristo kaj pentrinto?	gardisto kaj gardanto?

9 Traduku kaj rakontu numeron 1.

10 Skribu leteron al eksterlanda korespondanto.

⁸ ĉi-kune – voluit: *kun ĉi tiu (letero)*. De ontwikkeling van het Esperanto staat meer dergelijke bijwoordelijke verbindingen toe. B.v.: *ĉi-apude, ĉi-sube, ĉi-pere* e.d., waarin **ĉi** als een verkorte vorm van *ĉi tie* moet worden beschouwd. Opgemerkt moet worden, dat dezelfde verbinding met een zelfstandig naamwoord dikwijls voorkomt: *ĉi-dome, ĉi-tempe, ĉi-matene, ĉi-kunvene, ĉi-maniere* enz.

LES 23

1 Legu:

La hejma telegrafo.

En la lernejo la instruisto instruis pri la funkciado de telegrafo. Li rakontis, ke oni faras per iu aparato ian signalon, kaj ke tra la drato fluas la kurento kaj kaŭzas je la fino de la drato per alia aparato la saman signalon. Per tio oni povas sendi komunikon de iu urbo al alia.

“Ho, sinjoro instruisto”, diris Petro, “mi pensas, ke ni havas telegrafon hejme.”

“Ĉu vere?”, demandis la instruisto, “ĉu vi ne eraras?”

“Ne, sinjoro! Ni hundo estas telegrafo!”

“Via hundo! Tion mi ne povas kompreni.”

“Ho, sinjoro! Ni hundo estas vera telegrafo. Kiam mi pinĉas ĝian voston, ĝi mordas per la buŝo!”

2 Tiu kantanta knabino estas mia fratino.

La falanta infano ploris.

La falinta kraĵono kuŝas sur la planko.

Oni forportis la mortintan ĉevalon.

La fumonta knabo forprenis cigaredon.

La promenonta sinjoro prenas siajn ĉapelon kaj bastonon.

Dat zingende meisje is mijn zuster.

Het vallende kind huilde.

Het gevallen potlood ligt op de vloer.

Men bracht het gestorven paard weg.

De jongen die zou gaan roken, nam een sigaret weg.

De heer die zal gaan wandelen, neemt zijn hoed en stok.

De achtervoegsels *-ant*, *-int* en *-ont*, kunnen ook bijvoeglijk gebruikt worden. Met *-anta*, *inta* en *-onta* worden de *bedrijvende* deelwoorden gevormd van de tegenwoordige tijd, de verleden tijd en de toekomstige tijd.

3 Silentu, mi estas laboranta.

Kiam vi venis, mi estis skribanta leteron.

Kiam vi venos je la sesa, ili estos manĝantaj.

Wees stil, ik ben aan het werk.

Toen jij kwam, was bezig een brief te schrijven.

Wanneer je om zes uur komt, zullen ze aan het eten zijn.

De werkwoordsvorm op *-anta* kan deel uitmaken van het gezegde, evenals elk bijvoeglijk naamwoord (vgl.: *mi estas sana*, *vi estas feliĉa*, *li estos gaja*).

Dan betekent:

mi estas -anta:	ik ben bezig met
mi estis -anta:	ik was bezig met
mi estos -anta:	ik zal bezig zijn met

- 4 *Fine mi estas skribinta tiun leteron.*
Kiam li venis, ni estis manĝintaj.
Morgaŭ mi estos forveturinta. *Eindelijk ben ik klaar met het schrijven van die brief.*
Toen hij kwam, hadden we net gegeten.
Morgen zal ik vertrokken zijn.

De werkwoordsvorm op *-inta* kan deel uitmaken van het gezegde en drukt dan uit, dat de handeling op een bepaald moment voltooid is. Dus dan betekent:

mi estas -inta: ik ben (juist) klaar met
mi estis -inta: ik was (juist) klaar met
mi estos -onta: ik zal (juist) klaar zijn met

- 5 *Atentu, la instruisto estas parolonta.*
Kiam li foriris, mi estis enironta.
Morgaŭ je la deka ni estos forvojaĝontaj. *Let op, de onderwijzer zal gaan spreken.*
Toen hij wegging, zou ik juist binnengaan.
Morgen om tien uur zullen we klaar staan om op reis te gaan.

De werkwoordsvorm op *-onta* kan deel uitmaken van het gezegde en drukt dan uit, dat op een bepaald moment de handeling op het punt staat te gebeuren. Dus dan betekent:

mi estas -onta: ik sta op het punt te
mi estis -onta: ik stond op het punt te
mi estos -onta: ik zal op het punt staan te

Opm.: Er zijn dus in het Esperanto negen samengestelde tijden, naast de drie enkelvoudige, terwijl het Nederlands in totaal acht tijden kent. Het is dus niet mogelijk, elke Nederlandse tijd weer te geven door één Esperantotijd, of omgekeerd. Een goede raad: gebruik zoveel mogelijk de enkelvoudige tijden; alleen om kleine nuances in de betekenis aan te geven, kan men de samengestelde tijden nemen.

- 6 *Kiam ni promenis, ekpluvis.*
Bonvolu eksidi.
La ĉeestantoj ekstaris.
La patro ekparolis.
Mi ne povis ekdormi.
La knabino ekridis. *Toen wij wandelden, begon het plotseling te regenen.*
Gaat u zitten.
De aanwezigen stonden op.
Vader begon te spreken.
Ik kon niet inslapen.
Het meisje barstte in lachen uit.

Het voorvoegsel *-ek* drukt het begin van een handeling uit.

Dit begin is uiteraard meer of minder kort. Zeer kort zijn b.v. *ekvidi* (bemerken) en *ekkanti* (aanheffen).

De gebeurtenis kán zich plotseling voordoen – zoals bijv. bij 'in lachen (of tranen) uitbarsten, resp. *ekridi* en *ekplori*, of bij een plotselinge bui, *ekpluvi*.

Maar noodzakelijk is dit niet en soms is de aanvang wel te voorzien, zoals bij regen dikwijls het geval is, of bij bijv. 'labori'. En het komt voor dat de handeling (en dus ook de aanvang daarvan) wordt verzocht of aangemoedigd (ga toch zitten zeg! - waarna men '*eksidas*'), of aangekondigd (zullen we maar opstappen? - waarna men '*ekstaras*').

7 Lernu:

funkciado	<i>werking</i>	boli	<i>koken (van een vloeistof)</i>
aparato	<i>apparaat, toestel</i>	direkti	<i>sturen, richten</i>
signalo	<i>signaal, sein</i>	escepti	<i>uitzonderen</i>
drato	<i>draad (metaal)</i>	esprimi	<i>uitdrukken</i>
fadeno	<i>draad, garen</i>	informi	<i>inlichten</i>
kurento	<i>stroom (elektrisch)</i>	informpeti	<i>informereren</i>
kaŭzo	<i>oorzaak, reden</i>	karesi	<i>liefkozen</i>
bastono	<i>stok</i>	laŭdi	<i>prijzen, loven</i>
escepto	<i>uitzondering</i>	logi	<i>lokken</i>
esprimo	<i>uitdrukking</i>	plendi	<i>klagen</i>
informo	<i>inlichting</i>	progresi	<i>vorderen</i>
kareso	<i>liefkozing</i>	puŝi	<i>duwen, stoten</i>
laŭdo	<i>lof</i>	pruvi	<i>bewijzen</i>
libertempo	<i>vakantie</i>	rifuzi	<i>weigeren</i>
plendo	<i>klacht</i>	respekti	<i>eerbiedigen</i>
progreso	<i>vordering, vooruitgang</i>	riski	<i>wagen</i>
puŝo	<i>duw, stoot</i>	sekvi	<i>volgen</i>
pruvo	<i>bewijs</i>	elektra	<i>elektrisch</i>
rifuzo	<i>weigerin</i>	akurata	<i>stipt op tijd⁹</i>
respekto	<i>eerbied</i>	akra	<i>scherp, fel</i>
risko	<i>risico</i>	klara	<i>helder, duidelijk</i>
sekvo	<i>gevolg</i>	kripla	<i>gebrekkig</i>
zono	<i>gordel, ceintuur</i>	lama	<i>kreupel</i>
funkcii	<i>functioneren</i>	libera	<i>vrij</i>
kaŭzi	<i>veroorzaken</i>	alloga	<i>aanlokkelijk</i>
pinĉi	<i>knijpen</i>	modesta	<i>bescheiden</i>
eksidi	<i>gaan zitten</i>	respektinda	<i>eerbiedwaardig</i>
ekstari	<i>gaan staan</i>	sekvanta	<i>volgende</i>
ekdormi	<i>inlapsen</i>	adiaŭ	<i>vaarwel</i>

⁹ *akurata* heeft altijd betrekking op **tijd**. Men komt *akurate* (= op tijd) en men betaalt zijn rekeningen *akurate*.

adiaŭi	<i>vaarwel zeggen</i>	apenaŭ	<i>nauwelijks</i>
aboni	<i>zich abonneren op, een abonnement heb- ben, geabonneerd zijn op</i>	sekve	<i>bijgevolg, dus</i>

Ne ĉio utilas, kio brilas.

't Is niet alles goud, wat er blinkt.

8 *Respondu:*

Ĉu kuranta knabo uzas promenbastonon? Ĉu vi scias la diferencon inter dra-
to kaj fadeno? Ĉu patrino ŝatas karesi sian junan infanon? Ĉu vi ofte plen-
das pri tro multe da laboro? Ĉu via konduto estas laŭdinda? Kial vi rifuzis lian
inviton? Kiom da libertempo vi havas? Ĉu vi konas multajn Esperantajn espri-
mojn? Ĉu en Esperanto estas esceptoj? Je kioma horo vi ekdormis hieraŭ? Ĉu
vi jam abonis Esperantan ĵurnalon? Ĉu vi ĉiam tradukas precize? Ĉu lama
viro estas kripla? Kiu tago ĉiam sekvas post ĵaŭdo? Ĉu ĉiam post la 30-a de iu
monato sekvas la 1-a de la sekvanta monato?

9 Traduku kaj rakontu numeron 1.

10 Rakontu pri via korespondado.

LES 24

1 Legu:

Kial li ploris?

Sur la strato staris malgranda knabo. Plorante li serĉis ion sur la tero. Preterpasanta sinjoro vidis lin kaj bonkore demandis: “Kial vi ploras, kara knabeto? Ĉu vi eble falis?”

“Ne, sinjoro, mi ne falis, sed mi perdis cendon. Mi ricevis ĝin de mia onklo, kiu vizitis nin. Ĝi falis el mia mano, dum mi kuris al la butikoj; kaj mi ne povas retrovi ĝin.”

“Nu, mia kara, ne plu ploru. Jen alia cendo.” Doninte cendon al la knabo, la sinjoro foriris. Sed li estis farinta nur kelkajn paŝojn, kiam la knabo denove ploras.

Turninte sin li demandis: “Kial vi nun ploras? Ĉu ankaŭ la alia cendo falis?”

“Ne, sinjoro, sed se mi ne estus perdinta mian unuan cendon, mi nun havus du!”

2 Kial vi ne respondas?

Mi ne konas la kaŭzon, kial ŝi ploras.

Tial li ne fidus vin.

Ial ŝi ne volis kanti.

Infanoj ridas kaj ploras ĉial.

Nenial vi devas fari tion.

Waarom antwoord je niet?

Ik weet de reden niet, waarom zij huilt.

Daarom vertrouwt hij je niet.

Om de een of andere reden wilde zij niet zingen.

Kinderen lachen en huilen overal om.

Om geen enkele reden moet je dat doen.

De korelativoj op *-al* duiden een reden aan.

3 Ridante li rakontis la historion.

Sidante mi ne povas vidi vin.

Biciklante rapide vi povos atingi lin.

Starante ili akceptis la gratulojn.

Lachende vertelde hij de geschiedenis.

Zittende kan ik je niet zien.

Door snel te fietsen kun je hem bereiken (inhalen).

Staande namen zij de gelukwensen in ontvangst.

Alle bedrijvende deelwoorden kunnen bijwoordelijk gebruikt worden (*-ante*, *-inte*, *-onte*). Ze vervangen dan een bijwoordelijke bijzin. *-ante* wordt gebruikt, wanneer de handeling van de bijzin zich voltrekt tegelijk met de handeling van de hoofdzin (vaak een bijzin met *terwijl* of *doordat*).

4 Salutinte ni foriris.

Skribinte la leteron, mi forsendis ĝin.

Nadat we gegroet hadden, gingen we weg.

Nadat ik de brief geschreven had, verzond ik hem.

Biciklinte tre rapide, ni estas
laca.
Puninte la knabon, la patro par-
donis lin.

*Nu (omdat, nadat) we heel snel
gefietst hebben, zijn we moe.
Nadat de vader de jongen gestraft
had, vergaf hij hem.*

-inte wordt gebruikt, wanneer de handeling van de bijzin vooraf-
gaat aan de handeling van de hoofdzin (vooral bijzinnen met *na-
dat*).

5 Fumonte, la patro prenis la ta-
bakujon kaj la pipon.
Batonte hundon, oni serĉas bas-
tonon.
Forironte, mi salutis mian patri-
non.
Manĝonte, ni eksidis ĉe la tablo.

*Daar hij van plan was te roken,
nam vader de tabakspot en de pijp.
Wanneer men van plan is een hond
te slaan, zoekt men een stok.
Toen ik op het punt stond weg te gaan,
groette ik mijn moeder.
Om te eten gingen we aan tafel zitten.*

-onte wordt gebruikt om aan te duiden, dat de handeling van de
bijzin bedoeld is, of op het punt staat te geschieden, tijdens de
handeling van de hoofdzin.

Opmerking: bij het gebruik van *-ante*, *inte*, *-onte* moet erop gelet
worden, dat hoofdzin en bijzin hetzelfde onderwerp hebben, dus:

Manĝinte li foriris.
Post kiam ni manĝis (of: estis
manĝintaj), li foriris.

*Nadat hij gegeten had, ging hij weg.
Nadat wij gegeten hadden, ging
hij weg.*

6 Mi ne ŝatas babilemajn homojn.
Vi estas tro scivolema.
Ĉu lia edzino estas aĉetema?
Mia fratino estas helpema kna-
bino.

*Ik houd niet van babbelzieke mensen.
Je bent te nieuwsgierig.
Is zijn vrouw kooplustig?
Mijn zus is een hulpvaardig meisje.*

Het achtervoegse *-em* duidt een neiging of een gewoonte aan;
voor een voorbijgaande lust gebruikt men echter niet *-em*.
Vergelijk:

Mi estas scivola, kion vi faros.
Mia najbarino estas scivolema
virino.

*Ik ben benieuwd, wat je zult doen.
Mijn buurvrouw is een nieuwsgierige
vrouw.*

7 *Lernu:*

paŝo	<i>pas, stap</i>	preterpasi	<i>voorbijgaan</i>
fido	<i>vertrouwen</i>	fidi	<i>vertrouwen</i>
puno	<i>straf</i>	puni	<i>straffen</i>
monpuno	<i>boete</i>	babili	<i>babbelen</i>

pipo	<i>pijp</i>	spiri	<i>ademen</i>
membroj	<i>ledematen</i>	enspiri	<i>inademen</i>
vizaĝo	<i>gelaat</i>	elspiri	<i>uitademen</i>
makzelo	<i>kaak</i>	palpi	<i>tasten</i>
frunto	<i>voorhoofd</i>	maĉi	<i>kauwen</i>
brovo	<i>wenkbrauw</i>	gluti	<i>slikken</i>
palpebro	<i>ooglid</i>	gustumi	<i>proeven</i>
okulvitroj	<i>bril</i>	rampi	<i>kruipen</i>
lango	<i>tong</i>	ofendi	<i>beledigen</i>
cerbo	<i>hersenen</i>	babilema	<i>babbelziek</i>
kubuto	<i>elleboog</i>	scivol(em)a	<i>nieuwsgierig</i>
stomako	<i>maag</i>	aĉetema	<i>kooplustig</i>
ripo	<i>rib</i>	helpema	<i>hulpvaardig</i>
pulmo	<i>long</i>	nerv(em)a	<i>zenuwachtig</i>
genuo	<i>knie</i>	nuda	<i>naakt</i>
muskolo	<i>spier</i>	preter	<i>voorbij, langs</i>
nervo	<i>zenuw</i>	ial	<i>om een of andere</i>
vejno	<i>ader</i>	ĉial	<i>reden</i>
osto	<i>bot, been</i>	nenial	<i>overal om</i>
ostaro	} <i>geraamte</i>	nudkape	<i>nergens om</i>
skeleto		<i>wervel</i>	<i>blootshoofds</i>
vertebro		nudpiede	<i>barrevoets</i>
vertebraro	<i>wervelkolom</i>		

8 *Respondu:*

Per kio vi vidas? Ĉu vi uzas okulvitrojn? Ĉu vi estas babilema? Ĉu la frunto estas super la nazo? Kiom da dentoj vi havas? El kiom da vertebro konsistas la vertebraro? Ĉu vi ofte promenas nudkape? Kial malgrandaj infanoj rampas? Ĉu vi fidas vian patron? Ĉu vi iam pagis monpunon? Kie estas la sango? Ĉu la koro estas en la kapo? Kio estas en la buŝo? Ĉu ĉiuj lernantoj estas laboremaj? Ĉu studanta lernanto ĉiam estas studema? Por kio vi uzas viajn pulmojn? Kion vi faras per via cerbo? Kiom da membroj vi havas?

9 *Invullen:*

La falint..... knabo ridant..... ekstaris. Ekstarint..... li vidis sian sangant..... genuon. Li foriris lamant.... Hejmenvenint..... li laŭte ploris. La patrino alvenis kurant..... Vidint..... la genuon ŝi prenis tukon kaj per tiu ŝi lavis ĝin Sidant.... kaj ankoraŭ plorant..... la knabo rigardis sian zorgant..... patrinon. Dankint.... ŝin li prenis libron kaj legant..... li forgesis sian dolorant..... genuon.

10 Traduku kaj rakontu numeron 1.

11 Rakontu pri la homa korpo.

LES 25

1 Legu:

Tro da fervoro.

Iu sinjorino dungis novan, junan servistinon. La knabino atente aŭskultis, kiam la sinjorino klarigis al ŝi la laboron, kiun ŝi devos fari.

Antaŭ la fenestro staris vitra ujo, en kiu naĝis du orfiŝoj. La sinjorino tre ŝatis la fiŝojn kaj ŝi ordonis al la servistino bone zorgi pri ili: ĉiun tagon ŝi devas doni al ili freŝan akvon kaj purigi la ujon.

La knabino komencis la laboron, kaj la sinjorino estis tre kontenta. Sed post kelkaj tagoj la orfiŝoj aspektis malsanaj: ili ne naĝis kaj ne manĝis la nutraĵon, kiun la sinjorino ĵetis en la akvon.

Tial ŝi vokis la servistinon kaj demandis, ĉu ŝi bone zorgis pri la fiŝoj. “Ho jes, sinjorino!” respondis la knabino. “Ĉiun tagon mi purigis la ujon kaj refreŝigis la akvon. Mi purigis ankaŭ la fiŝojn kaj eĉ poluris ilin per polurpasto, por ke ili belege brilu.”

- 2 Li estas konato de mia patro.
La arestito klopodis forkuri.

*Hij is een kennis van mijn vader.
De gearresteerde (arrestant) probeerde
weg te lopen.*

Ĉu vi estas la ekzamenoto?
Vi eraras, mi estas unu el la
ekzamenontoj.

Bent u de examinandus?

Kiu estos la delegito al la kun-
veno?

*U vergist zich, ik ben een van de
examinatoren.*

*Wie zal de afgevaardigde naar
de vergadering zijn?*

-ato vormt van een werkwoord de naam van een persoon, die de werking ondergaat; *-ito* die van een persoon, die de werking ondergaan heeft; *-oto-* die van een persoon, die de werking ondergaan zal.

- 3 La batata knabo laŭte ploris.
La batita hundo forkuris.
La lernota leciono estas tre mal-
facila.

*De jongen die geslagen werd, huilde luid.
De geslagen hond liep weg.
De te leren les is erg moeilijk.*

De achtervoegsels *-at*, *-it* en *-ot* kunnen ook bijvoeglijk gebruikt worden. Met *-ata*, *ita* en *ota* worden de *lijdende* deelwoorden gevormd van de tegenwoordige tijd, de verleden tijd en de toekomstige tijd.

- 4 La knabo ploras, ĉar li estas
batata.
La ŝtelisto estis severe gardata.

*De jongen huilt, want hij wordt
geslagen.
De dief werd streng bewaakt.*

La gazeto estos legata tra la tuta mondo. *De krant zal over de gehele wereld gelezen worden.*

De werkwoordsvorm op *-ata* kan deel uitmaken van het gezegde en drukt dan uit, dat de werking *wordt* ondergaan, dus:

mi estas-ata: *ik ben in de toestand, dat ik de werking onderga;*
mi estis-ata: *ik was in de toestand, dat ik de werking onderging.*
mi estos-ata: *ik zal in de toestand zijn, dat ik de werking onderga.*

- 5 Ne plu serĉu, via plumo estas trovita. *Zoek niet langer, je pen is gevonden.*
Oni ĝojis, ĉar la forkurinta leono estis kaptita. *Men was blij, want de weggelopen leeuw was gevangen.*
Mi esperas, ke la milito estos baldaŭ finita. *Ik hoop dat de oorlog spoedig beëindigd zal zijn.*

De werkwoordsvorm op *-ita* kan deel uitmaken van het gezegde en drukt dan uit, dat de werking ondergaan *is*, dus:

mi estas-ita: *ik ben in de toestand dat ik de werking ondergaan heb;*
mi estis-ita: *ik was in de toestand dat ik de werking ondergaan had;*
mi estos-ita: *ik zal in de toestand zijn dat ik de werking ondergaan heb.*

La letero al mia amiko estas skribota. *De brief aan mijn vriend zal dadelijk geschreven worden.*
Kiam vi venis hieraŭ, la kunveno estis fermota. *Toen je gisteren kwam, zou de vergadering net gesloten worden.*
Morgaŭ je la deka mi estos ekzamenota. *Morgen om tien uur zal ik op het punt staan te worden geëxamineerd.*

De werkwoordsvorm op *-ota* kan deel uitmaken van het gezegde en drukt dan uit, dat het onderwerp op het punt staat de werking te ondergaan, dus:

mi estas-ota: *ik sta op het punt de werking te ondergaan;*
mi estis-ota: *ik stond op het punt de werking te ondergaan;*
mi estos-ota: *ik zal op het punt staan de werking te ondergaan.*

- 7 Donu al tiu malriĉulo iom da manĝaĵo. *Geef die arme wat eten.*
Akvo estas klara fluidaĵo. *Water is een heldere vloeistof.*
Malgrandaj infanoj ŝatas frandaĵon. *Kleine kinderen houden van een snoepje.*
Mi dankas vin pro via amikaĵo. *Ik bedank je voor je vriendendienst.*
Ĉu vi ofte manĝas bovaĵon? *Eet je vaak rundvlees?*
Mi preferas porkaĵon. *Ik houd meer van varkensvlees.*

Het achtervoegsel *-aj* vormt de namen van concrete dingen en van naar buiten waarneembare uitingen van gevoelens. Verbonden met een diernaam geeft het vaak de naam aan van een gerecht.

- | | |
|------------------------------------|---------------------------------------------|
| 8 <i>Mi vizitos mian bofraton.</i> | <i>Ik zal mijn zwager bezoeken.</i> |
| <i>Ĉu vi konas mian bofilon?</i> | <i>Kent u mijn schoonzoon?</i> |
| <i>Kie loĝas viaj bogepatroj?</i> | <i>Waar wonen je schoonouders?</i> |
| <i>Li estas mia bokuzo.</i> | <i>Hij is een aangetrouwde neef van me.</i> |

Het voorvoegsel *bo-* duidt een verwantschap aan, ontstaan door een huwelijk.

9 *Lernu:*

<i>fervoro</i>	<i>ijver, vuur</i>	<i>bofilo</i>	<i>schoonzoon</i>
<i>vitro</i>	<i>glas (stofnaam)</i>	<i>bopatro</i>	<i>schoonvader</i>
<i>nutraĵo</i>	<i>voedsel</i>	<i>bogepatroj</i>	<i>schoonouders</i>
<i>polurpastro</i>	<i>poetspommade</i>	<i>dungi</i>	<i>huren (in dienst nemen)</i>
<i>arestito</i>	<i>arrestant, gevangene</i>	<i>lui</i>	<i>huren (van zaken)</i>
<i>ekzamenato</i>	<i>examinandus</i>	<i>klarigi</i>	<i>uitleggen, verklaren</i>
<i>ekzamenanto</i>	<i>examinator</i>	<i>ordoni</i>	<i>bevelen</i>
<i>delegito</i>	<i>afgevaardigde</i>	<i>purigi</i>	<i>schoonmaken</i>
<i>gazeto</i>	<i>krant</i>	<i>aspekti</i>	<i>eruitzien</i>
<i>vundo</i>	<i>wond</i>	<i>nutri</i>	<i>voeden</i>
<i>vundito</i>	<i>gewonde</i>	<i>ĵeti</i>	<i>gooien, werpen</i>
<i>manĝaĵo</i>	<i>eten</i>	<i>refreŝigi</i>	<i>verfrissen</i>
<i>fluidaĵo</i>	<i>vloeistof</i>	<i>poluri</i>	<i>poetsen</i>
<i>frandaĵo</i>	<i>snoeperij, snoepje</i>	<i>ekzameni</i>	<i>onderzoeken, examineren</i>
<i>amikaĵo</i>	<i>vriendendienst</i>	<i>delegi</i>	<i>afvaardigen</i>
<i>bovaĵo</i>	<i>rundvlees</i>	<i>vundi</i>	<i>wonden</i>
<i>porko</i>	<i>varken</i>	<i>frandi</i>	<i>snoepen</i>
<i>porkaĵo</i>	<i>varkensvlees</i>	<i>ŝerci</i>	<i>schertsen</i>
<i>ŝafo</i>	<i>schaap</i>	<i>sprita</i>	<i>geestig, grappig</i>
<i>ŝafaĵo</i>	<i>schapenvlees</i>	<i>freŝa</i>	<i>fris, vers</i>
<i>ovaĵo</i>	<i>eiergerecht</i>	<i>pura</i>	<i>schoon</i>
<i>spritaĵo</i>	<i>geestigheid, grap</i>	<i>fluida</i>	<i>vloeibaar</i>
<i>novaĵo</i>	<i>nieuws</i>	<i>severa</i>	<i>streng</i>
<i>diversaĵoj</i>	<i>allerlei</i>	<i>eĉ</i>	<i>zelfs</i>
<i>parto</i>	<i>deel</i>		
<i>bofrato</i>	<i>schoonbroer, zwager</i>		

- | | |
|---------------------------------------|-----------------------------------|
| <i>Mi estas tre okupita.</i> | <i>Ik heb het erg druk.</i> |
| <i>Peke akirita ne estas profita.</i> | <i>Gestolen goed gedijt niet.</i> |

10 Respondu:

Ĉu vi iam estis ekzamenata? Ĉu la lernantoj estas batataj? Ĉu perdita mono estas ĉiam trovata? Ĉu vundita fingro doloras? Kion vi preferas, ĉu bovaĵon aŭ porkaĵon? Ĉu ĉiuj kreskaĵoj estas nutraĵoj? Ĉu akvo estas fluidaĵo? Ĉu bovaĵo estas parto de ŝafo? Ĉu vi ofte manĝas frandaĵon? Ĉu bofrato estas la edzo de fratino aŭ frato de la edzino? Ĉu vi ofte rakontas spritaĵojn? Ĉu la glaso estas el vitro? Ĉu vi ĵetas monon en la akvon? Per kio vi nutras vin?

11 Traduku kaj rakontu numeron 1.

12 Rakontu iun spritaĵon.

LES 26

1 Legu:

Sur herbejo sin paŝtis bovino, ĉevalo kaj azeno. Paŝtinte sin dum kelka tempo, ili ekdisputis pri la demando, kiu el ili estis la plej utila dum la lasta milito. “Kompreneble mi estis la plej utila besto dum la milito”, diris la ĉevalo. “Kiu portis la kavalerianojn? Kiu tiris la ĉarojn? Estis mi! Se mi ne estus farinta tion, la soldatoj certe ne estus venkintaj la malamikon!” La bovino malrapide kapneis dirante: “Sed kiu el ni nutris la armeon? Kies lakto donis la buteron al la soldatoj? Kies viandon ili manĝis? Estis la bovinoj, kiuj plifortigis la soldatojn. Do mi estas pli utila ol vi ambaŭ!”

Aŭdinte la parolon de la bovino, la azeno levis la kapon, skuis la longajn orelojn kaj diris: “Tamen vi malpravas. Ne vi, sed mi, la azeno, estis la plej utila besto dum la milito. Se ne estus azenoj en la mondo, la milito tute ne ekzistus!”

- | | |
|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 2 Batate la knabo ploris.
Arestate, la ŝtelisto insultis la policanon.
Helpate de mia amiko, mi finis la laboron. | <i>Terwijl hij geslagen werd, huilde de jongen.
Terwijl hij gearresteerd werd, schold de dief de politieagent uit.
Geholpen door mijn vriend maakte ik het werk af.</i> |
|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Alle lijdende deelwoorden kunnen bijwoordelijk gebruikt worden (-ate, -ite, -ote). Ze vervangen dan een bijwoordelijke bijzin. -ate wordt gebruikt wanneer de handeling van de bijzin zich voltrekt tegelijk met de handeling van de hoofdzin (vaak een bijzin met *terwijl* of *doordat*).

- | | |
|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 3 Batite, la hundo forkuris.
Lavite, la infanoj iris al la lernejo.
Perdite, la fontoplumo estis netrovebla. | <i>Nadat hij geslagen was, liep de hond weg.
Nadat ze gewassen waren, gingen de kinderen naar school.
Nadat de vulpen verloren was, was hij onvindbaar.</i> |
|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

-ite wordt gebruik, wanneer de handeling van de bijzin voorafgaat aan de handeling van de hoofdzin (vaak een bijzin met *nadat*).

- | | |
|----------------------------|---------------------------------------------------------------|
| 4 Batote, la knabo ploris. | <i>Toen hij dreigde geslagen te worden, huilde de jongen.</i> |
|----------------------------|---------------------------------------------------------------|

-ote wordt gebruikt om aan te duiden, dat de handeling van de bijzin op het punt staat te geschieden tijdens de handeling van de hoofdzin. Het komt slechts zeer sporadisch voor.

Opmerking: Bij het gebruik van *-ate*, *-ite*, *-ote* dient erop gelet te worden, dat hoofdzin en bijzin hetzelfde onderwerp hebben. Zeg dus **niet**:

- | | |
|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| Enfermite, mi sendas al vi la deziratajn poŝmarkojn.
Maar:
Enferminte (of: Ĉi-kune) mi sendas al vi la deziratajn poŝmarkojn.
Of:
Enfermite, la dezirataj poŝmarkoj estas sendataj al vi. | <i>Nadat ik ingesloten ben, zend ik u de verlangde postzegels.</i>
<i>Ingesloten (Hierbij) zend ik u de verlangde postzegels.</i>
<i>Ingesloten worden u de verlangde postzegels toegezonden.</i> |
| 5 La alteco de la turo estas sesdek metroj.
Mi kompatas ilian malriĉecon.
Riĉeco ne ĉiam donas feliĉon.
La fluideco de akvo estas pli granda ol de siropo.
Lia bonkoreco estas sincera. | <i>De hoogte van de toren is zestig meter.</i>
<i>Ik heb medelijden met hun armoede.</i>
<i>Rijkdom geeft niet altijd geluk.</i>
<i>De vloeibaarheid van water is groter dan van stroop.</i>
<i>Zijn hartelijkheid is oprecht.</i> |

Het achtervoegsel *-ec* duidt een eigenschap aan.

- | | |
|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 6 La alteco de tiu altaĵo ne estas granda.
Per tiu amikaĵo li montris sian amikecon.
La noveco de tiu novaĵo estas dubinda. | <i>De hoogte van die heuvel is niet groot.</i>
<i>Door die vriendendienst toonde hij zijn vriendschap.</i>
<i>De nieuwheid van dat nieuwtje is twijfelachtig.</i> |
|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Let erop, dat het achtervoegsel *-ec* de eigenschap zelf aanduidt, terwijl *-aĵ* iets aanduidt, dat de eigenschap bezit (*-ec* vormt abstracte, *-aĵ* concrete zelfstandige naamwoorden).

- | | |
|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| 7 La plej aĝa reĝido iam estos reĝo.

En la stalo staris bovino kun sia bovido.
Kiom da porkidoj havas la porkino?
La kat(in)o ludis kun siaj (kat-) idoj. | <i>De oudste prins (koningszoon) zal eens koning zijn.</i>
<i>In de stal stond een koe met haar kalf.</i>
<i>Hoeveel biggen heeft de zeug?</i>
<i>De kat speelde met haar jongen.</i> |
|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

Het achtervoegsel *-id* duidt een afstammeling of kind aan (bij dieren dus het jonge dier).

8 Lernu:

herbejo	<i>weide</i>	reĝido	<i>prins, konings- zoon</i>
kavaleriano	<i>cavalerist</i>	bovino	<i>koe</i>
ĉaro	<i>kar, wagen</i>	bovido	<i>kalf</i>
venko	<i>overwinning</i>	porkino	<i>zeug</i>
armeo	<i>leger</i>	porkido	<i>big</i>
opinio	<i>mening</i>	paŝti sin	<i>grazen</i>
riĉeco	<i>rijkdom</i>	disputi	<i>twisten</i>
malriĉeco	<i>armoede</i>	tiri	<i>trekken</i>
fluideco	<i>vloeibaarheid</i>	rajdi	<i>rijden (als ruiter, ook wel van fietsers)</i>
siropo	<i>stroop</i>	venki	<i>overwinnen</i>
dikeco	<i>dikte</i>	kapnei	<i>neen schudden</i>
alteco	<i>hoogte</i>	kapjesi	<i>ja knikken</i>
altaĵo	<i>hoogte (heuvel)</i>	plifortigi	<i>versterken</i>
amikeco	<i>vriendschap</i>	skui	<i>schudden</i>
noveco	<i>nieuwheid</i>	malpravi	<i>ongelijk hebben</i>
eco	<i>eigenschap</i>	ekzisti	<i>bestaan</i>
dubo	<i>twijfel</i>	insulti	<i>uitschelden</i>
stalo	<i>stal</i>	senegala	<i>onvergelijkelijk,</i>
ido	<i>telg, afstamme- ling; jong (van dier)</i>	sincera	<i>enig</i>
opinii	<i>van mening zijn</i>	kies	<i>oprecht</i>
egali	<i>gelijk zijn</i>		<i>wiens</i>
dubi	<i>twijfelen</i>		
dubinda	<i>twijfelachtig</i>		
egala	<i>gelijk</i>		

Ĉu estas permesate fumi ĉi tie?
Dirite, farite.
Kiel akirite, tiel perdite.
Donacetoj subtenas amikecon.

*Mag hier gerookt worden?
Zo gezegd, zo gedaan.
Zo gewonnen, zo geronnen.
Kleine geschenken onderhouden
de vriendschap.*

9 Respondu:

Kie sin paŝtas la ŝafoj? Kiam la bovinoj estas sur la herbejo? Ĉu azeno estas granda besto? Ĉu dek metroj egalas dekameton? Ĉu vi ofte opinias same kiel mi? Ĉu armeo ĉiam venkas? Ĉu vi ofte disputas kun via amiko? Ĉu riĉeco estas feliĉeco? Kiom estas la longeco de kilometro? Ĉu katido estas ido de kato? Kio estas la nomo de ido de ĉevalo? Kies utileco estas pli granda: de ĉevalo aŭ de bovino?

10 Kio estas:

malfacilaĵo; bonaĵo; malpuraĵo; vidindaĵo; kreskaĵo; ŝafido; leonado; boneco; ĉevalido; reĝidino; longeco; malamikeco; grandeco; facileco; pureco; honesteco.

11 Traduku kaj rakontu numeron 1.

12 Rakontu pri viaj ecoj.

LES 27

1 Legu:

Kiu pendigos la sonorilon?

Sub la planko de granda domo vivis multaj musoj. Dum la nokto ili venis el siaj truoj kaj kuris en la ĉambrojn, en la kuirejon kaj en la kelon. Tie ili serĉis manĝorestaĵojn, por ke ili ne mortu pro malsato. Ili trovis sufiĉe da nutraĵo kaj estis tute kontentaj.

Sed la sinjorino ne ŝatis la musojn, pri kies dumnoktaj vizitoj ŝi estis malkontenta. Tial ŝi aĉetis katon. Ĝi estis granda, nigra besto, kies brilantaj okuloj, molaj piedoj kaj akraj ungoj signifis danĝeron por la musoj. Jam en la unua nokto ĝi kaptis kvin el ili. Tiam la musoj ne plu kuraĝis iri el la truoj; ili ne povis manĝi kaj la malsato dolorigis iliajn stomakojn.

Post kelkaj tagoj ili kunvenis por preparoli la danĝeran situacion. Maljuna muso estis la prezidanto de la kunveno, kaj unu muzo post la alia mallaŭdis la katon, kies konduto jam kaŭzis la morton de kvin musoj, kaj eble kaŭzos ĉies morton. Bedaŭrinde la kato ne aŭdis tiun mallaŭdon. Tamen se ĝi estus aŭdinta tion, ĝi certe ne estus forkurinta.

Sed nenies protestoj solvis la aferon. Fine malgranda muso ekparolis. Ĉiuj estis scivolaj, kion la malgrandulo proponos. Ĝi diris: “Ni ne povas aŭdi la katon pro ties molaj piedoj. Se ni nur aŭdus ĝin! Mi iam vidis en la ŝranko de la infanoj strangan objekton. Kiam oni puŝas ĝin, ĝi sonoras. Mi proponas, ke ni prenu tion kaj pendigu ĝin sur la kolon de la kato. Tiam ni povos aŭdi la danĝeran beston, kiam ĝi alvenas, kaj ni havos tempon por forkuri kaj kaŝi nin.”

Ĉiuj aplaŭdis; tio estas la rimedo! Ili dancis kaj estis tre gajaj, ĉar ili povos denove serĉi nutraĵon kaj ne plu sentos la doloron de la stomako. Sed subite mallaŭta voĉo diris: “Kiu pendigos la sonorilon sur la katon?”

Kaj ĉiuj silentis!

2 Kies ĉapelo estas tio?

Knabo, kies gepatroj mortis, estas orfo.

Jen via frato: ties helpon mi bezonas.

Mi trovis ies libron.

Mi bezonas ĉies helpon.

Kial vi aŭskultis nenies konsilon?

Wiens hoed is dat?

Een jongen, wiens ouders gestorven zijn, is een wees.

Daar is je broer; diens hulp heb ik nodig.

Ik heb iemands boek gevonden.

Ik heb ieders hulp nodig.

Waarom luisterde je naar niemands raad?

De korelativoj op *-es* noemen de eigenaar.

3 Bonvolu disdoni la paperojn.

La butikisto dissendis cirkulerojn.

Deel alsjeblijft de papieren uit.

De winkelier zond circulaire rond.

Ni klopodu disvastigi Esperanton.

Laten we trachten Esperanto te verbreiden.

Ne distrompetu viajn pekojn.

Bazuin je zonden niet rond.

Post la kunveno ĉiuj disiris.

Na de vergadering gingen allen uiteen.

Het voorvoegsel *dis-* betekent verspreiding naar alle richtingen.

4 Pranepo estas la filo de nepo.

Een achterkleinzoon is de zoon van een kleinzoon.

Praavo estas la patro de avo.

Een overgrootvader is de vader van een grootvader.

Niaj prapatroj jam loĝis en nia lando antaŭ 2000 jaroj.

Ons voorouders woonden 2000 jaar geleden al in ons land.

En la pratempo ne ekzistis atombomboj.

In de oertijd bestonden er geen atombommen.

Ĉu vi iam estis en praarbaro?

Ben je ooit in een oerwoud geweest?

Het voorvoegsel *pra-* duidt een ver verwijderde bloedverwantschap of iets zeer ouds, voorhistorisch aan.

5 De woordvorming in het Esperanto geschiedt volgens het '*principo de sufiĉo*', d.w.z. men vermijdt het gebruik van overbodige voor- en achtervoegsels. Zo gebruikt men meestal:

trovaĵo	voor trovitaĵo	<i>vondst, gevonden voorwerp</i>
okazaĵo	voor okazintaĵo	<i>gebeurtenis</i>
frandemo	voor frandemeco	<i>snoepzucht</i>
aĉetemo	voor aĉetemeco	<i>kooplust</i>

6 *Lernu:*

sonorilo	<i>bel, schel</i>	senti	<i>voelen, gevoelen</i>
truo	<i>gat</i>	kovri	<i>bedekken, toedekken</i>
restaĵo	<i>rest, overblijfsel</i>	moki	<i>spotten, bespotten</i>
malsato	<i>honger</i>	pendi	<i>hangen</i>
situacio	<i>situatie, toestand</i>	pendigi	<i>ophangen</i>
mallaŭdo	<i>afkeuring, blaam</i>	soni	<i>klinken</i>
protesto	<i>protest</i>	sonori	<i>luiden (onoverg.)</i>
objekto	<i>voorwerp, ding</i>	sonorigi	<i>schellen, (doen)</i>
propono	<i>voorstel</i>		<i>luiden</i>
rimedo	<i>middel</i>	signifi	<i>betekenen</i>
orfo	<i>wees</i>	dolorigi	<i>pijn veroorzaken</i>
konsilo	<i>raad</i>	mallaŭdi	<i>afkeuren, misprijzen</i>
cirkulero	<i>circulaire</i>	protesti	<i>protesteren</i>
trumpeto	<i>trompet, bazuin</i>		
peko	<i>zonde</i>		

pranepo	achterkleinzoon	solvi	oplossen
praavo	overgrootvader	proponi	voorstellen
prapatroj	voorvaderen	kaŝi	verbergen
pratempo	oertijd	aplaŭdi	applaudisseren
praarbaro	oerwoud	disdoni	rondgeven, uitdelen
atomo	atoom		
bombo	bom	dissendi	rondzenden
abundo	overvloed	disvastigi	verspreiden, verbreiden
egalpezo	evenwicht		
atombombo	atoombom	vasta	wijd, uitgestrekt
distrumpeti	rondbazuinen	abunda	overvloedig
disiri	uiteengaan	ties	diens
detrui	verwoesten, vernielen	ies	iemand's
		ĉies	ieders
(dum)nokta	nachtelijk	nenies	niemand's
mola	zacht, week	stranga	vreemd, zonderling

Kies panon oni manĝas, ties agojn oni laŭdas.

Wiens brood men eet, diens woord men spreekt.

7 Respondu:

Kies libro estas tio? Kies infano vi estas? Kies ido estas leonido? Kies patrino estas bovino? Kies feliĉo estas plej granda? Kies loĝejo estas orfejo? Kies gepatroj ne plu vivas? Ĉu ĉies vizito estas bonvena? Kies viziton vi ne ŝatas? Kies nazon vi ne povas vidi? Ĉu via praavo ankoraŭ vivas? Kie troviĝas praarbaroj? Ĉu atombombo povas detrui tutan urbon? Ĉu ekzistas praarbaroj en nia lando?

8 Kion signifas:

nevenkebla; kovrilo; postkuranto; mokinda; trumpetisto; egalulo; paŝtejo; disputanto; kuraĝulo; dubebla; dubinda.

9 Traduku kaj rakontu numeron 1.

10 Rakontu pri via studado.

LES 28

1 Legu:

La juna Zamenhof.

La 15-an de decembro 1859 naskiĝis en la pola urbo Bjalistok knabo, kiu havis de la patrino la senteman koron, de la patro la inteligentan cerbon, kaj de la urbo la impreson pri multa miskompreno. Tiu knabo estis Ludoviko Lazaro Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo Esperanto.

Jam kiel knabo li vidis en sia urbo la malfacilaĵojn, kiujn kaŭzis la fakto, ke tie loĝis diversaj homoj parolantaj malsamajn lingvojn. Troviĝis tie poloj, germanoj, rusoj kaj judoj. Ili ĉiuj parolis sian propran lingvon, kaj pro tio ofte estis miskomprenoj, disputoj, eĉ bataloj. Li vidis tra la fenestro de la hejmo, ke sur la strato la knaboj postkuras judon, mokas lin pro lia stranga parolo, kaj ĵetas ŝtonojn. Preterpasantaj rusoj nur ridas pri la knaba turmentado.

Sur la vendoplaco li aŭdis la disputon inter pola vendistino kaj germana aĉetanto. Ili ne bone komprenis unu la alian pro la diferencaj lingvoj. Kiam venis rusa policisto por solvi la disputon, li postulis, ke ili ambaŭ parolu la rusan lingvon, kaj la diverseco estis nur pli granda. Tiam venis en la juna knabo la ideo pri unu lingvo kiel helpilo, por ke la diversaj homoj komprenu unu la alian kaj estu paco anstataŭ batalo en la mondo.

2 Kiom estas la duono de dudek ok?

Muso ne povas manĝi tiom, kiom elefanto.

Donu al mi iom da butero.

Ĉu via frato manĝis ĉiom?

La knabino manĝis neniom.

Hoeveel is de helft van achtentwintig?

Een muis kan niet zoveel eten als een olifant.

Geef me een beetje (wat) boter.

Heeft je broer alles opgegeten?

Het meisje at niets.

De korelativoj op *-om* duiden een hoeveelheid aan; ze kunnen dus gevolgd worden door *da*.

Soms is er weinig verschil tussen de korelativoj op *-o* en die op *-om*.

Vergelijk echter:

Donu al mi *ion*.

Donu al mi *iom*.

Geef me wat (het een of ander ding).

Geef me wat (de een of andere hoeveelheid).

3 La libroj kostas tri eŭrojn.

La libroj kostas po tri eŭrojn.

La sakoj pezas cent kilogramojn.

La sakoj pezas po cent kilogramojn.

Mi donis al la infanoj dek pomojn.

Mi donis al la infanoj po tri pomojn.

De boeken kosten drie euro (samen).

De boeken kosten elk drie euro.

De zakken wegen 100 kg (samen).

De zakken wegen 100 kg per stuk.

Ik gaf de kinderen 10 appels.

Ik gaf de kinderen ieder drie appels.

Het voorzetsel *po* betekent: *per stuk, per eenheid, elk*; het staat steeds vlak voor het telwoord. In bovenstaande voorbeelden hoort dit voorzetsel bij *het telwoord* en niet bij het lijdend voorwerp dat daarop volgt. Het wordt dus als *bijwoord* gebruikt, als gevolg waarvan het gewoonlijk wél door een bepaling met de *-n* gevolgd wordt.

4 Lia patro estas lernejestro. Ĉu vi jam vidis la novan urbestron? Estas nur unu ŝipestro sur la ŝipo. Mia onklo estis policestro.	<i>Zijn vader is hoofd van een school. Heb je de nieuwe burgemeester al gezien? Er is maar één kapitein op het schip. Mijn oom is commissaris van politie geweest. Vijf personen vormen het bestuur van die vereniging.</i>
Kvin personoj formas la estraron de tiu societo.	

Het achtervoegsel *-estr* betekent: *hoofd of leider*.

5 Lernu:

polo	<i>Pool</i>	aprobo	<i>goedkeuring</i>
Pollando	<i>Polen</i>	miro	<i>verbazing</i>
ruso	<i>Rus</i>	ŝtono	<i>natuursteen</i>
judo	<i>jood</i>	senti	<i>(ge)voelen</i>
sento	<i>gevoel</i>	impresi	<i>indruk maken</i>
impreso	<i>indruk</i>	miskompreni	<i>misvatten</i>
aŭtoro	<i>auteur, schrijver</i>	krei	<i>scheppen</i>
miskompreno	<i>misverstand</i>	postkuri	<i>achterna lopen</i>
fakto	<i>feit</i>	turmenti	<i>plagen, kwellen</i>
vendoplaco	<i>marktplaats</i>	moki	<i>(be)spotten</i>
polico	<i>polico</i>	formi	<i>vormen</i>
policisto	} <i>politieagent</i>	aprobi	<i>goedkeuren</i>
policano		<i>politie-commissaris</i>	miri
policestro	<i>verschillen</i>	propra	<i>eigen</i>
diverseco	<i>hoofd der school</i>	sentema	<i>gevoelig</i>
lernejstro	<i>burgemeester</i>	inteligenta	<i>intelligent</i>
urbestro	<i>schip</i>	fakte	<i>inderdaad, feitelijk</i>
ŝipo	<i>kapitein, schipper</i>	anstataŭ	<i>in plaats van</i>
ŝipestro	<i>baas, chef</i>	tiom	<i>zoveel</i>
estro	<i>bestuur</i>	iom	<i>iets</i>
estraro	<i>vereniging</i>	ĉiom	<i>alles</i>
societo	<i>zak</i>	neniom	<i>niets</i>
sako		po	<i>elk, per stuk</i>

Kiom da homoj, tiom da gustoj. *Smaken verschillen*
Kiom da kapoj, tiom da opinioj. *Zoveel hoofden, zoveel zinnen.*

6 *Respondu:*

Kiom da fingroj vi havas? Ĉu vi manĝas ĉiom? Kiu manĝis neniom? Kiom kostas tiuj pomoj? Kiom da gramoj egalas kilogramon? Kiom da sakoj povas kuŝi sur ĉaro? Ĉu la poloj loĝas en Rusujo? Kiu kreis Esperanton? Ĉu policisto apartenas al la polico? Ĉu estas diferenco inter policano kaj policisto? Ĉu azeno estas inteligenta besto? Ĉu oni vendas librojn sur la vendoplaco? Kiu estas via lernejestro? Ĉu vi konas la urbestron? Kiom da ŝipestroj estas sur la ŝipo? Ĉu ĉiu societo havas estraron? Ĉu vi ŝatas turmenti bestojn?

7 *Invullen:*

Ki.... kostas t.... libroj? Ti.... libroj kostas po tri eŭrojn. Ĉu ti.... prezo estas tro alta por ti.... libroj? Ki.... librojn vi ŝatas legi? Vi certe ne legas ti.... da libroj ki.... mia frato. Ti.... knabo legas ĉi.... vesperon dum unu horo, ki.... ni jam estas en la lito. Mi ne scias, ki.... li ĉi.... sukcesas akiri ti.... da libroj. Ĉi.... kaj al ĉiu.... li demandas: "Ĉu vi havas i.... libron por mi?" Ti.... li legas ĉi.... libroj. Mi ne komprenas ki.... li ŝatas ti.... Mi tre ŝatas legi, sed ne ĉi.... La patro ne aprobas ti.... legadon; li mem neni.... legas libron, sed li legas nur la ĵurnalon, pri ki.... la frato miras. Mi estas scivola, ki.... libron li nun pruntos, ĉu la libron de la kuzo aŭ de la najbaro?

8 Traduku kaj rakontu numeron 1.

9 Rakontu kial vi lernas Esperanton.

LES 29

1 Legu:

La internacia lingvo.

La juna Zamenhof vizitis la gimnazion kaj tie lernis la grekan kaj latinan lingvojn. Komence li supozis, ke la latina lingvo povos esti taŭga helplingvo por rompi la murojn inter la popoloj diverslingvaj.

Dum jarcentoj la scienculoj diskutis pri ĉiaj temoj per la latina lingvo. Sed jam baldaŭ li spertis, ke tiu lingvo ne taŭgas por lia celo. Ĝi estas tro malfacila por esti lernata de simpla homo, kaj mankas en ĝi esprimoj por modernaj ideoj.

Tial Zamenhof ekpensis, ĉu estus eble konstrui tute novan lingvon. Matematike li konstruis vortojn: ba, ca, da ktp.; sed li mem ne povis rememori la signifojn. Li komprenis, ke estos necese ĉerpi la vortradikojn el jam ekzistantaj lingvoj. Tamen ankaŭ tiel estos necese memori grandan nombron da vortoj, kaj li ektimis pro la amplekso de la lernota vortaro.

Tiam li hazarde vidis, promenante en la stratoj de sia loĝurbo, kelkajn surskribojn sur la domoj. Lin trafis, ke tiuj vortoj finiĝas per la sama litergrupo. Kaj tiam li eksciis, ke estos eble per sufiksoj kaj prefiksoj formi multajn vortojn el nur unu radiko. La problemo de la granda vortaro estis solvita.

- | | |
|-------------------------------|---------------------------------------|
| 2 Ŝi purigas la vestojn. | <i>Zij maakt de kleren schoon.</i> |
| Mi akriĝas mian tranĉilon. | <i>Ik slijp mijn mes.</i> |
| La vento sekigas la stratojn. | <i>De wind droogt de straten.</i> |
| Oni liberigis la soldatojn. | <i>Men bevrijdde de soldaten.</i> |
| Ni blankigos la plafonon. | <i>Wij zullen het plafond witten.</i> |
| Plenigu la glason. | <i>Vul het glas.</i> |

Verbonden met de wortel van een bijvoeglijk naamwoord betekent *-igi*: *maken, brengen in de toestand, uitgedrukt in het grondwoord.*

- | | |
|-------------------------------------------|----------------------------------------------------|
| 3 La reĝo soldatigis ĉiujn junajn virojn. | <i>De koning maakte alle jonge mannen soldaat.</i> |
| La propagandisto anigis multajn homojn. | <i>De propagandist maakte veel mensen lid.</i> |

Verbonden met de wortel van een zelfstandig naamwoord betekent *-igi* *maken tot wat het grondwoord uitdrukt.*

- | | |
|----------------------------------------|-----------------------------------------------|
| 4 Li mortigis la hundon. | <i>Hij doodde de hond.</i> |
| Morgaŭ oni starigos statuon. | <i>Morgen richt men een standbeeld op.</i> |
| Ni kuŝigis la pacienton sur la divanon | <i>We legden de patiënt op de divan neer.</i> |
| La kuiristino boligas la lakton. | <i>De kokkin kookt de melk.</i> |
| Oni dronigos la katidojn. | <i>Men zal de katjes verdrinken.</i> |

Mi pendigas la surtuton sur la vesthokaron.

Ik hang de overjas aan de kapstok.

Verbonden met de wortel van een werkwoord betekent *-igi*: *doen*. Het maakt onovergankelijke werkwoorden overgankelijk.

5 Mi havas monon.

Ik heb geld.

Mi havigas monon.

Ik verschaf geld.

Mi scias tion.

Ik weet dat.

Mi sciigas tion al vi.

Ik deel dat aan u mee.

Mi sciigas vin pri tio.

Ik licht u daarover in.

Ook van overgankelijk werkwoorden kan men afleidingen met *-igi* maken (zie ook [les 31](#)).

6 Vi ĉiam miskomprenas min.

Je begrijpt me altijd verkeerd.

La patro punis la knabon pro lia miskonduto.

De vader strafte de jongen voor zijn wangedrag.

Ne misuzu la violonon.

Misbruik de viool niet.

Vi mistradukis tiun esprimon.

U heeft die uitdrukking verkeerd vertaald.

Het voorvoegsel *mis-* betekent: *verkeerd, fout*; het kan vaak vervangen worden door *erare, malbone* (*vi erare tradukis, li malbone kondutis*).

7 Lernu:

helplingvo

hulptaal

rilato

betrekking

gimnazio

gymnasium

diskuti

bespreken, discussiëren

scienco

wetenschap

scienculo

geleerde

celi

mikken, bedoelen

celo

doel

manki

mankeren, ontbreken

manko

gebrek

matematiko

wiskunde

(re)memori

zich herinneren

radiko

wortel

ĉerpi

putten, scheppen

amplekso

omvang

ektimi

schrikken

vortaro

woordenboek

trafi

treffen

surskribo

opschrift

finigi

eindigen, uitgaan

sufikso

achtervoegsel

akrigi

slijpen

prefikso

voorvoegsel

sekigi

drogen

statuo

standbeeld

liberigi

bevrijden

divano

divan

blankigi

witten

paciento

patiënt

plenigi

vullen

dronanto

drenkeling

starigi

oprichten

surtuto

overjas

kuŝigi

neerleggen

hoko

haak

faligi

vellen, doen vallen

vesthokaro	kapstok	misuzi	misbruiken
miskonduto	wangedrag	mistraduki	verkeerd vertalen
violono	viol (muziekinstr.)	droni	verdrinken
violo	viooltje (bloem)	ornami	versieren
ornamaĵo	sieraad, versiersel	sonĝi	dromen (in de slaap)
oriento	oosten	revi	dromen (luchtkastelen bouwen)
okcidento	westen	rilati	betrekking hebben op
nordo	noorden	originala	origineel, oorspronkelijk
sudo	zuiden	komence	in 't begin, eerst
origino	oorsprong, herkomst	latina	Latijns
greka	Grieks	ktp.	enzovoort (kaj tiel plu)
simpla	eenvoudig	litero	letter
moderna	modern		
malmoderna	ouderwets		

Kiu tro sin pravigas, tiu mem sin kulpigas.

Wie zich verontschuldigt, beschuldigt zich.

8 *Respondu:*

Per kio vi akriĝas la kraĵonon? Ĉu en via urbo estas statuo? Ĉu paciento estas sana homo? Ĉu vi povas plenigi plenan glason? Ĉu la lampo pendas super la tablo? Kion vi pendigas sur la muron? Ĉu pra estas sufikso? Kiu prefikso signifas returne? Ĉu violono estas floro? Ĉu vi scias la grekan lingvon? Ĉu vi studis matematikon? Ĉu la latina lingvo estas moderna? Ĉu vi baldaŭ ektimas? Kio mankas al via feliĉo? Ĉu scienculo multe studas? Ĉu en via urbo estas multaj malmodernaj domoj? Ĉu norda vento blovas norden? Kien blovas okcidenta vento? Ĉu Esperanto estas helpilingvo? Ĉu vi iam vundis vian fingron? Ĉu vi ofte revas dum la leciono? Kiam vi sonĝas?

9 *Aldonu la literon n, kie tio necesas:*

Mi esperas, ke vi bone lernis viaj lecionoj. Ili ofte estas facilaj, sed kelkfoje estas malfacilaĵoj en ili. Ĉu vi faris multaj eraroj? Ĉu la instruisto skribas la malfacilaj vortoj sur la nigra tabulo? Se vi ĉiam lernis la vortoj kaj esprimoj, vi baldaŭ estos bona esperantisto. Sed ne pensu, ke ĉiu lernanto faras tio. Mi scias, ke post kelka tempo multaj perdos la kuraĝo; sed iu tago vi bedaŭros, se vi ne plu studis. Esperanto povas esti utila helpilo por la rilatoj inter homoj en diversaj landoj. Se vi iam vojaĝos eksterlande, vi eble tie trovos esperantistoj, kun kiuj vi povos paroli. Per Esperanto vi povos kompreni ili, kaj ili vi. Do, studu bone, por ke vi iam estu lerta esperantisto.

10 Traduku kaj rakontu numeron 1.

11 Rakontu pri iu sonĝo.

LES 30

1 Legu:

La kreado de Esperanto.

En la gimnazio Zamenhof lernis unue la francan kaj germanan lingvojn kaj poste ankaŭ la anglan. Lin trafis la facileco de la angla gramatiko. Li spertis, ke lingvo povas esti riĉa, kvankam la gramatiko estas plej facila. Do li konstruis novan lingvon kun tre simpla gramatiko kaj kun vortaro, kies radikojn li ĉerpis el la ekzistantaj lingvoj. La plej admirinda trajto de tiu lingvo estas ĝia genia sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj.

Kelkaj lernantoj en lia klaso interesiĝis pri lia laboro, kaj la 5-an de decembro 1878 ili kune festis la ekeston de la nova helplingvo, kantante entuziasme himnon de frateco. Sed la sekvan jaron ili finis la studadon en la gimnazio kaj disiris. Zamenhof restis sola kun sia projekto de artefarita helplingvo. Tamen li daŭrigis la laboron, ŝanĝante kaj plibonigante la unuan projekton. Multajn malfacilaĵojn li devis kontraŭbatali. Ofte li malesperis; tamen li venkis, helpate de sia fianĉino kaj ŝia patro, kiu finance subtenis la eldonadon de la unua broŝuro. Per tiu broŝuro d-ro Esperanto komunikis en la jaro 1887 al la mondo sian projekton de internacia helplingvo. La pseŭdonimo 'd-ro Esperanto' iĝis la nomo de la nova lingvo. Kaj nuntempe ĉiuj konas la vorton Esperanto kaj scias, ke ĝi signifas artefaritan helplingvon, kreitan de d-ro Zamenhof.

- | | |
|-----------------------------------|-------------------------------------------------|
| 2 Kial vi ruĝiĝas? | <i>Waarom bloos je?</i> |
| Li paliĝis pro timo. | <i>Hij werd bleek van vrees.</i> |
| La folioj sekiĝas pro la varmo. | <i>De bladeren drogen door de warmte.</i> |
| La sitelo tute malpleniĝis. | <i>De emmer liep helemaal leeg.</i> |
| Depost hieraŭ la situacio aliĝis. | <i>Sinds gisteren is de toestand veranderd.</i> |

Verbonden met de wortel van een bijvoeglijk naamwoord betekent *-iĝi*: *worden*.

- | | |
|-----------------------------------------|---------------------------------------------------|
| 3 Mia frato edziĝis hieraŭ. | <i>Mijn broer is gisteren getrouwd.</i> |
| Ĉu via fratino jam edziniĝis? | <i>Is je zuster al getrouwd?</i> |
| Miaj gepatroj geedziĝis antaŭ 25 jaroj. | <i>Mijn ouders zijn 25 jaar geleden getrouwd.</i> |
| En la vintro vesperiĝas frue. | <i>'s Winters wordt het vroeg avond.</i> |
| Ĉu jam tagiĝas? | <i>Wordt het al dag?</i> |

Verbonden met de wortel van een zelfstandig naamwoord betekent *-iĝi*: *worden*.

- | | |
|--------------------------------------------|---------------------------------------------------------------|
| 4 En nia lando ne troviĝas leonoj. | <i>In ons land bevinden zich geen leeuwen.</i> |
| Baldaŭ montriĝis, ke li ne diris la veron. | <i>Spoedig bleek, dat hij niet de waarheid gesproken had.</i> |
| La ĉielo kovriĝis per nuboj. | <i>De hemel bedekte zich met wolken.</i> |

